

ESPERANTO

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

ABONO

Jara abono 2,00 \$ (5 fr. »)
 Luksa eldono. 2,50 \$ (6 fr. 25)
 La abonoj komenciĝas de la 1^a de ĉiu monato.

DIREKTORO :

HECTOR HODLER

REKLAMO

Reklamo (1 linio aŭ ĝia spaco). 20 Sd.
 Anonceto (1 linio : 10 vortoj) 15 Sd.
 Korespondado (1 enskribo) 20 Sd.
 Rabato da 10 % por 4 enpresoj, 25 % por 12 enpresoj; 50 % por 24 enpresoj.

Redaktejo & Administrejo : 10, rue de la Bourse, GENÈVE (Svisujo)

TEKSTO

Poŝtaj demandoj, H. HODLER.

Socia Vivo :

Skizoj el Irlando, A. CAUMONT.
 La Indiano de Nord-Ameriko, Ch.-A. EASTMANN.
 La geedziĝaj moroj ĉe la Siberiaj Burjatoj, I. SERIŠEV.
 Nova Sudamerika fervojo, F.-E. THIERACH.
 Reformo de la nutrado, R. RAJCI.
 La muŝoj. transportantoj de infektaj malsanoj, A. G.
 Notoj. — Okazontaĵoj.

Esperantismo :

Al niaj Legantoj. — Kroniko.
 Krakovaj Kongresoj. — Diversaĵoj.
 Tra la gazetaro.

U. E. A. :

Oficiala informilo. — Novaj Deleĝitoj.
 Ŝanĝoj. — Organiza demando.
 Pri esperantistaj hejmoj.
 Nekrologio.
 Fakaj societoj. — Alvokoj.

Aldono : La Propagandisto.

POŝTAJ DEMANDOJ

Mi mirigos neniu, se mi diros, ke la internacia poŝto estas unu el la publikaj servoj, kiujn plej ofte uzadas la Esperantistaro. Ĉi tiu do estas rekte interesata pri ĝia bona funkciado kaj ĝiaj progresoj, kaj, pro sia internaciema spirito, ĝi havas la devon atenti pri la diversaj faktoj koncernantaj la evoluadon de tiu gravega servaro, kiu ludas tiel signifan rolon en nia moderna vivo.

Kiel oni scias, la progresoj de la monda poŝta trafiko estas ŝuldataj precipe al la fondo de la Universala Poŝta Unio (1), kiu grandparte forigis la sennombrajn komplikaĵojn antaŭe ekzistantajn en la internacia trafiko kaj alportis la gravan profiton de la unuforma tarifo de la korespondadoj kaj presaĵoj. Ebligante tiun interkonsenton, la iniciatintoj de la Poŝta Unio certe helpis multe al la plifaciligado de la interpopolaj rilatoj. Tion cetere konfesis la svisa federala konsilanto Borel, kiam li malfermis la unuan kunvenon por la fondo de la poŝta interkonsento (Bern, 1874) : « ... Labori por la fondo de l'internacia poŝta unuigo estas labori por la bono de l'homaro kaj al la granda verko de civilizado. Ĉiuj en tiu rilato efektiviĝintaj progresoj utilas al la ŝtatoj kiel al la individuoj, al la malriĉuloj kiel al la riĉuloj, al la bezonoj de l'morala mondo kiel al la materiaj interesoj. Ili kontentigas la bezonojn de l'koro kiel tiujn de l'komerco, de la scienco kaj de l'industrio ; ili alproksimigas la naciojn kiel

la familiojn kaj helpas al la ideala perfektigo de la homa gento, donante al la homo la rimedojn etendi sian laboron al la tuta terĝlobo... ».

La Poŝta Unio, kiu komence ampleksis dek-tri landojn, nun etendiĝas super la tuta mondo (2). Ĝi fariĝis la plej kompleta tipo de internacia organizaĵo, kun sia leĝdona potenco reprezentata de la kongresoj kaj konferencoj, sia ĵurga potenco, sia administra oficejo, sia lingvo (la franca), sia pezunuo (la gramo) kaj sia monunuo (la franko). Dum la lasta jaro la nombro de la sendaĵoj interŝanĝitaj super ĝia teritorio atingis 50.000 milionojn.

Se la fondo de la Poŝta Unio estis grandega progreso rilate al la antaŭa stato, estas nedubeble, ke kiel ĉiuj homaj institucioj — ĝi povas kaj devas fari ankoraŭ novajn progresojn. Cetere, de la jaro kiam ĝi estis fondita, ĝi senteble progresis. Ĝi ne nur gajnis novajn landojn, sed interne de ĝi diversaj interkonsentoj estas faritaj inter la plej antaŭenemaj regnoj por krei novajn servojn, ekzemple pri poŝtmandatoj, poŝtrepagoj, abonado de la gazetoj ĉe la poŝtoŝticejoj, respondkuponoj — tiu lasta aparte ŝatata de la Esperantistoj.

Ni nun mallongze ekzamenu la diversajn plibonigojn, kiuj estas plej dezirataj. Ni kompreneble parolas pri progresoj realigeblaj sen tro granda skuo kaj kiom permesas la nuntempa organizo de la poŝto bazata sur la nacia organizo.

La plej ĝenerala postulo de ĉiuj rondoĵoj havantaj internaciajn rilatojn estas la plimalaltigo de la letera afranko ĝis kvar spesdekoj (3). En tiu rilato iaj progresoj estas faritaj

(2) La solaj landoj ne ankoraŭ aliĝintaj estas Beluĉistano kaj Afganistano.

(3) Vidu pri tio ESPERANTO de 5 novembro 1911 : *Universala poŝta afranko* (F. Pillath).

(1) Vidu resumon de ĝia historio kaj de la poŝtaj rilatoj antaŭ ĝia kreo en ESPERANTO de 20 oktobro 1909.

en la lastaj jaroj. Kvankam la lasta kongreso de Poŝta Unio en Romo (1906) malakceptis la malpli altigon de la poŝta tarifo, multaj najbaraj landoj subskribis interkonsentojn sekve de kiuj la enlanda tarifo estas aplikata al la leteroj intersanĝataj inter la kontraktintaj landoj. Ekzemple, Germanujo interkonsentis pri kvarspesdeka afranko kun Aŭstrio-Hungarujo, Luksemburgo kaj parte kun Usono; Granda Britujo same interkonsentis kun Usono; tuta Nord-Ameriko, Aŭstralio, Sud-Afriko formis similajn unuigojn. Plie, la kolonioj jam rilatas kun siaj respektivaj regnoj je la kvarspesdeka tarifo. Aliaj landoj estas nun en intertraktado por apliki la saman aranĝon en siaj poŝtaj rilatoj. Ni do estas sur la vojo al la realigo de tiu postulo. Ĉar por la ŝanĝo de tarifo kaj aliaj gravaj demandoj, la unuanimeco de la regnoj estas necesa, estas plej kredeble, ke la kvarspesdeka tarifo estos enkondukata iom post iom per interŝtataj kontraktoj. Tiu vojo certe ne estas la plej oportuna, sed en la nuna organizo de la Poŝta Unio, alia ne estas ebla. Kiam la nombro de la specialaj interkonsentoj estos ankoraŭ pli granda, oni facile povos ilin unuigi kaj ni tiam ricevos la unikan poŝtan afrankon por la plej granda faciligo de la internaciaj rilatoj. Kiel paŝo al tiu reformo kaj paralele al la agado per specialaj interŝtataj kontraktoj, oni povus klopodi, ke la venonta poŝtkongreso (Madrido 1913) favore konsideru la proponon pri malaltigo de la leterafranko ĝis 8 sd. (Kiel proponis Japanujo en 1906) aŭ 6 sd. kaj, daŭrigante la reformon komencitan en Romo, pli altigu la pezlimon de la leteroj de 20 gramoj (ĝi antaŭe estis 15 gramoj) ĝis 25 aŭ 30. Ĉar tiuj reformoj, ŝajne ne gravaj, havas — pro la granda trafiko — sufiĉe konsiderindajn budĝetajn konsekvencojn sur la financon politikon de la ŝtatoj, oni nepre ne povas iri tro rapide, kvankam fakte la sperto montris, ke plimalaltigo de la tarifo estis baldaŭ kompensata per pligrandigo de la trafiko. Ĉiukaze por atingi favorajn rezultatojn, estas necese, ke la interesataj rondoj kiel la komercaj ĉambroj, industriaj korporacioj, internaciaj organizaĵoj — kaj inter ili, kial ne ankaŭ la Esperantistaj? — faru energian agitadojn por agigi la koncernajn registarojn.

Sed se la malpli altigo de la afranka tarifo estas dezirinda, ne malpli utila estus la etendigo de la aliaj specialaj interkonsentoj al la tuta teritorio de la Poŝta Unio. En tiu rilato ekzistas ankoraŭ multaj malhelpaĵoj: El kaj al Hispanujo oni ne povas sendi poŝtmandatojn — fonto de sennombraj malagrablaĵoj — Rusujo, Argentino kaj kelkaj aliaj ne posedas respondkuponojn; la ekspedo de pakajoj obeas al komplikaj tarifoj, k. t. p. La malapero de tiuj esceptoj estas dezirata de ĉiuj, kiuj havas vere tutmondajn interrilatojn.

Aliparte la poŝto en kelkaj progresemaj landoj servas ne nur por transportado de leteroj kaj objektoj; ĝi ankaŭ faras aliajn servojn al la publiko. Ekzemple, diversaj regnoj interkonsentis por ke oni povu ĉiun gazeton aboni ĉe la poŝtoŝtationo sen plia elspezo. Aliaj subskribis interkonsentojn pri poŝtrepagoj, intersanĝoj de sendaĵoj kun deklarita valoro, k. t. p. Sed en tiuj interkonsentoj partoprenas ne ĉiuj regnoj. Citante nur la gravajn, Britujo, Francujo, Rusujo ne aliĝis al la interkonsento pri abono de la gazetoj (4), por Britujo, Rusujo, Usono poŝtrepagoj ne estas eblaj. Mi facile povus plimulti la ekzemplojn. Sufiĉas la ĉi-supraj por montri, ke pri tio ekzistas komplikaj, kies forigo estas urĝa. Se la krebaleco de apartaj unuigoj interne de la Poŝta Unio estas elemento de progreso, ĉar ĝi permesas al la antaŭeniremaj landoj kunligi, ĝi estas ankaŭ kaŭzo de komplikaj. La kulpo venas precipe de la poŝtadministracioj, kiuj en kelkaj landoj estas ofte tro rutinemaj aŭ nesufiĉe bone organi-

zitaĵoj, kaj ankaŭ parte de financaj kaŭzoj. La plej fundamenta rimedo estus, ke anstataŭ esti devigata alpreni siajn decidojn per unuanimeco (5), la Poŝta Unio havu la eblon decidi per absoluta plimulto aŭ per plimulto de la du trionoj, kiel nun okazas por la ne gravaj demandoj. Tiamaniere kiam iu servo estus decidata per la dirita plimulto, ĉiuj regnoj havus la devon ĝin aranĝi. Sed tia ŝanĝo estas malfacile realigebla, ĉar por ĝin fari oni ĝuste bezonas la unuaniman konsenton de la ŝtatoj. Tre duba estas, ke ili akceptus tian enmikson en sian propran administradon kaj la starigon de leĝodona kaj leĝofara superŝtato. Ke la poŝto iam fariĝos « supernacia » servaro, tio estas verŝajna kaj esperebla, sed ni ne ankoraŭ alvenis je tiu stadio. Ŝajnas do, ke nuntempe oni ne povas esperi multon per agado ĉe la Poŝta Unio mem sed ke oni devas sin limigi al energia klopodado ĉe la prokrastemaj landoj, por ke ili aliĝu al la ekzistantaj interkonsentoj. Tiu agado devas esti samtempe nacia kaj eksternacia. Unuparte, la nacioj mem ĝin faras por plifaciligi la rilatojn de la lando kun la ekstero; aliparte, la alilandanoj dezirante pli oportune komuniki kun la koncerna lando simile klopodas. Se tiu agado estas aranĝata sufiĉe unuforme kaj sisteme, estas certe, ke iom post iom la landoj, kiuj rilate al tio staras nun malantaŭe, aliĝos al la diritaj interkonsentoj, kiuj ampleksinte sufiĉe multajn regnoj sin trudos al ĉiuj, ĉu pro sia propra utileco, ĉu pro evito de la komplikaj rezultataĵoj de la diverseco.

Pri tiuj demandoj, U. E. A., kiam ĝi estos pli forta kaj ampleksos pli grandan publikon de interesuloj kaj fakuloj, kiel firmaoj, komercaj ĉambroj, internaciaj societoj, povos fari utilajn kolektivajn servojn, kunigante la pli-malpli izolajn plendojn kaj dezirojn de la publiko de la poŝtuzantoj kaj klopodante pri ilia kontentigo. Por tio la unua kondiĉo estas, ke niaj Delegitoj sin liberigu de la ideo, ke U. E. A., estas pure esperantista organizaĵo.

Ĉiukaze estas neeviteble, ke pro la kreskantaj internaciaj rilatoj la specialaj interkonsentoj pli kaj pli etendiĝos kaj universaligos. Same, konsiderante tion, kio jam okazas en kelkaj bone administrataj landoj, la poŝto pli kaj pli organizos servojn por la utilo de la publiko, pli speciale de la aferista publiko. La institucio de la poŝtaj ĉekkontoj ekzistantaj en kelkaj landoj kaj baldaŭ internaciigota inter ili, la uzo de la poŝtoŝtationoj por la pagado de la impostoj, la kreo de poŝtaj ŝparkasoj, la starigo de kreditleteroj (6) montras, ke la socia rolo de la poŝto fariĝas ĉiutage pli grava kaj diversa. Ĝi ne nur estas transportanto, sed kvazaŭ bankisto kaj agento uzebla por la plej diversaj negocoperacioj.

Mi ĉi tie skizis nur kelkajn demandojn, kiuj egale interesas ĉiujn homojn aŭ instituciojn havantajn internaciajn rilatojn. Se al ilia studado kaj realigo la homoj dediĉas la kvaronon da tempo, kiun ili uzas por ofte tre vanaj demandoj de pura « principa » politiko, ni certe konstatus ankoraŭ pli sentebajn kaj rapidajn progresojn. Almenaŭ ni, Esperantianoj, kiuj jam vivas internacie pli ol la cetera popolamaso, havas la devon interesiĝi pri tiuj demandoj, kies solvo kavas gravan influon por la plibonigo de tiu internacia vivo, kiun helpis la deksespesdeka letero kaj la kvarspesdeka poŝtkarto, multe pli ol elokventaj paroladoj. H. HODLER.

AL NIAJ LEGANTOJ

Pro la multeco de la ricevitaj aliĝoj, ni aldonos al la venonta N-o jam la N-on 2-an de la **Intersanĝa Bulteno**.

Kun ĉi tiu N-o aperas **La Propagandisto**.

(5) Por alpreni la decidojn ĉe la kongresoj aŭ konferencoj, ĉiu lando havas unu voĉon. Kelkaj el ili havas plian voĉon por la kolonioj. Ekz. Francujo havas, krom sia, unu voĉon por Alĝerio, unu por Hinda-Hinujo kaj unu por la ceteraj kolonioj kane.

(6) Vidu ESPERANTO de 20 Aŭgusto 1911: *La poŝtaj kreditleteroj en Germanujo* (F. Pillath).

(4) Tial ESPERANTO, kiu estas presata en Francujo, ne estas abonebla ĉe la poŝtoŝtationoj.

GEOGRAFIO

Skizoj el Irlando (1)

II.

Oni konas la amon de la Angloj por la sportoj ; la Irlandanoj estas eble ankoraŭ pli sportamantoj. En la vetludoj de la du popoloj la lastaj tre ofte venkas pro sia natura lerteco kaj fortikeco. Tio montriĝas ankaŭ en la militservo, kaj la historio de la nacia milito verigas, ke en multaj bataloj la braveco de la irlandaj soldatoj decidis la venkon. Iru iun sabaton vespere en unu el la *People's parks* kaj vi vidos la kampon, kie la Belfastaj junuloj ekzercadas siajn fortojn kaj ellernas samtempe la submetiĝon eĉ dum la ludado.

La sido de Belfast ne estas tre rimarkinda. Ĉe la fundo de longa golfo ĝi kuŝas inter du vicoj de altaĵoj, kies unu norde altiĝas je la alteco de montaro kun en unu punkto ŝtonega supraĵo, nomita *Cave Hill*, kaŭze de la kavajoj, kiujn ĝi entenas. De ĝia pinto oni ĝuas belan vidajon sur la urbo, la golfo, la kamparo, la maro, kaj, rigardante okcidenten, sur la granda lago *Neagh*. Sed tiu ĉi montetaro estas tute senarba, borita nur per herboj, dornarbetoj kaj marĉejoj. La alia suda bordo de la Belfasta Golfo estas pli malalta kaj prezentas kamparon fruktodonan, bone kulturitan kaj kovritan per vilaoj, farmdomoj kaj vilaĝoj. Ĉe la ekstremajo de la golfo, kie malfermiĝas la maro, kuŝas la urbeto *Bangor*, amata rifuĝejo de la Belfastanoj, kiuj bezonas ripozon dum la somero kaj ŝatas marbanojn. La vilaĝoj sur la marbordo, kiuj ne estas interligitaj per fervojo, komunikadas inter si per veturiloj iom strangaj ; ili estas longaj ĉaroj kun ses aŭ pli da vicoj de benkoj, altiĝantaj unu post la alia, kaj tute malkovritaj. Kiam pluvos, kio ofte okazas en tiu klimato, la veturantoj devas sin ŝirmi sub siaj ombreloj. Tia veturado estas tiel malkara, ke eĉ la malriĉuloj ĝin ofte ĝuas.

Dank'al la ĝentileco de mia irlanda gastiganto mi povis ankaŭ vidi la irlandan kamparon. Fervoja veturado de unu horo, kaj poste unuhora veturado per kaleŝo, kondukis min en la mezon de la graflando *Derry* sur vastan kamparan bienon, malproksime de ĉiu urbo. De la ŝoseo bela alirejo venigis min al la domo, kiu estis parte farmo, parte vilao, tute nerimarkinda ekstere, sed interne komforta hejmo de riĉa kaj nobela sinjoro.

Tiu ĉi sinjoro estis juristo, kiu pasigis pli ol kvardek jarojn en Japanujo kaj Ĥinujo en la servo de la Brita Reĝnestro. Reveninte en sia patrolando kiel pensiulo, li estis kavalirigata kaj nun sin okupas pri terkulturado sur la prapatra bieno, kiun li tre plivastigis. Li evidente celas krei modelan farmbienon, ĉar li elspozas multe da mono por provizi la plej bonajn kampkulturilojn kaj konstrui novajn garbejojn kaj stalojn. Li ensemigis vastajn kampojn, aliajn li drenigis kaj fruktigis ; li plantis arbojn kaj plekto-barilojn. Meze de la bieno staras puto, kies akvo estas pumpata de la vento kaj disverŝata en ĉiujn direktojn, provizante ne nur la domon, sed la plej maproksimajn herbejojn. Ĉiuflanke mi vidas arojn da bovinoj kaj ŝafoj, kiuj pasigas sur la paŝtejoj la tutan tagon kaj la tutan nokton, kaj kies bona stato elmontras la zorgon de ilia mastro. Certe ne estas la kulpo de la bienulo, se tiel bone zorgata bieno ne produktas mirindaĵojn ; ĝi povas esti nur la kulpo de la ĉielo, kaj efektive la malseka, sunmanka klimato de Irlando kontraŭbatalas la penadojn de la terkulturisto : tro ofte la burĝonoj falas antaŭtempe, la grenoj putriĝas, la fruktoj ne maturiĝas ; nur la plej fortikaj specoj konstruaŝtaras kaj povas esti sukcese kulturataj. Sekve herbejoj ko-

vras la landon, kaj la kamparanoj sin nutras ĉefe per terpomoj. Nur la riĉuloj provizas sian tablon per fruktoj kaj bonĝustajoj, kiuj devenas de landoj pli privilegiitaj.

Dum la tago mia gastiganto lasas min al mi mem, kaj mi promenadas kaj observadas ; sed en la vespero, sidante en komforta salono antaŭ brulanta kamenfajro, kvankam estas julio, li malfermas la riĉaĵon de siaj spertoj, kaj mi multe lernas. Por ilustrati siajn rakontojn pri la japana lando, li vidigas al mi verajn trezorojn de japana arto : lakigitajn vazojn, kakimonojn belege ornamitajn, skulptaĵojn el ligno kaj eburo, pentraĵojn, eĉ japanajn vestojn ; kaj ĉiun objekton li klarigas per sia bona kono de la lando. Ĉu la artokoleklistoj de Londono kaj Parizo suspektas, ke tie, en izolita angulo de Irlando, loĝas tiel serioza konkuranto, kies trezoroj povus riĉigi la plej famajn muzeojn ? Nu, li estas nur unu ekzemplo, kaj oni opinias, ke inter la *retired gentlemen* de Granda Britujo estas multaj, kiuj el la lando de sia ekzilo kunportis en sian hejmon trezorojn similajn, kiel pruvo de ilia intereso al la homa laborado kaj pensado.

Iun posttagmezon, kiam la suno penege dispelinte la nubojn lumigis la herbejon antaŭ la fenestro de la salono, mia amiko diris al mi : « Ni faru ekskurson por vidi la najbaraĵon », kaj li tuj ordonis jungi la ĉevalon al la *break*. Post ne longe ni veturadis sur bona vojo inter altaj plekto-bariloj tra la kamparo. Kiam la vojo altiĝante permesis ĉirkaŭvidon, mia rigardo ampleksis grandegan spacon de ondoforma ebenaĵo, krucigita en ĉiuj direktoj de plekto-bariloj disigantaj la kampojn, surŝutita per farmdomoj, kies blankaj muroj agrable kontrastas kun la verdecigo de la pejzaĝo, kaj ĉirkaŭita en la malproksimeco de ĉeno da montoj. Laŭlonge la vojo ni preterpasis teretaĝajn dometojn kun paja tegmento, sur la sojlo grupo da infanoj nudpedaj kaj malpuraj ; apude anasoj kotplaŭdante en marĉeto kaj gruntantaj porkoj. Aliloke estis vico da domoj disfalintaj kaj forlasitaj de la loĝantoj, kiujn malriĉeco devigis elmigri Amerikon. Pli antaŭe ni laŭiris vastan torfejon, kie homoj sin okupadis tranĉante la torfon kaj ĝin ŝarĝante sur duradaj ĉaroj. Ni ankaŭ trapasis sur ponto kelkajn riveretojn inter salikoj. Alproksimiĝante urbeton, ni vidis longan muron. « Ĝi estas la bieno de mia amiko, la kolonelo P. », diris mia gvidanto. Kiel mi li ripozas post longa servado al la patrujo en eksterlando. Li nun utilas al la malgranda komunumo, kies ano li estas kiel magistrato. Mi havas plurajn kolegojn tie en simila situacio, kaj vizitado inter ni estas nia plej agrabla tempopasigilo ». La longeco de la ĉirkaŭmuro komprenigis al mi la vastecon de la bieno, kaj la multego da arboj, kiuj agitigis siajn suprajn super ĝi, min pripensigis pri la belaj ombroj, kiujn ili havigis al la feliĉaj promenantoj ĉe iliaj piedoj. Sed intertempe pezaj nuboj estis amasiĝintaj sur la ĉielo, kaj pluvego nin devigis rapidi hejmen.

(*Daurigota*).

P-RO A. CAUMONT (Lausanne).

La Indiano de Nord-Ameriko

La enlanduloj de Nord-Ameriko estis, en la momento de ĝia eltrovo, disigitaj laŭ pli-malpli movemaj grupoj sur la tuta supraĵo de la kontinento. La nomoj de iliaj gentoj kaj grupoj estas tiel multaj, ke eĉ sciencisto facile lin miksas. Tamen, dank'al la lingvistiko kaj aliaj procedoj, estas eble rekoni plurajn grandajn familiojn, el kiuj ĉiu havas siajn karakterizajn trajtojn kaj sian lokan temperamenton. Tiaj estas la Abenakis, la Apalaches, la Iroquois, la Algonquins, la Souan, k. t. p.

Oni kredas bone koni la fizikajn karakterojn de la raso, sed malgraŭ tio oftaj estas la eraroj. La haŭto estas nek ruĝa, nek kupra, sed ĉokoladkolora, kun nuancoj multe pli malhelaj en la sudo ol ĉe la loĝantoj de la norda regiono.

(1) Vidu *Esperanto* de 20 decembro.

Ordinare, la kapo estas bone skulptita, la nazo ne estas unuforme rekta, la haroj, ĝenerale nigraj kaj rigidaj, estas delikataj. Laŭ la plej bonaj kalkuloj, kiujn oni povis fari, la enlanda loĝantaro de Nord-Ameriko, je la fino de la dek-kvina jarcento, atingis ĉirkaŭ duonmilionon. De tiu epoko ĝi malgrandiĝis, sed ne tiom kiom oni kredas; nuntempe ĝi malrapide kreskas.

La politika reĝimo. — La politika reĝimo de la Nord-Amerika primitiva Indiano estis la demokratio, en ĝia plej simpla formo. Ĝia bazo estis la patriarka aŭ familia sistemo: la ĉefo de la klano posedis la superan aŭtoritaton. Li dumvive plenumis sian taskon, kiu je certaj rilatoj estis hereda. Tamen, se iam okazis, ke lia posteulo montriĝas malforta aŭ nedigna, la popolo lin forlasis kaj elektis kiel gvidanton la plej bonan kaj bravan homon de sia grupo. La potenco de la ĉefoj ne estis diktatora, sed granda estis ilia influo en la klano. Se la klano estis grava, la opinio de la ĉefo fariĝis tre efika en la konsilantaroj de la tuta gento. Pluraj klanoj kutime konsistigis bandon; la gento aŭ nacio konsistis el multaj bandoj, sed ordinare ne estis ĉefo por tuta nacio, nek eĉ por sama bando.

Resume, la indiana ĉefo estis nur perulo elektata de la klano, krom en la okazoj, kiam specialaj personaj kvalitoj aŭ pli malfrue la favoroj aŭ la estimo de la blankuloj donis al li nekutiman aŭtoritatecon. Ĉiuj demandoj interesantaj la prosperecon aŭ la famon de la klano devis esti submetataj al la ekzameno de la tuta popolo kaj la ĉefo devis sekvi ĝian decidon. La blankuloj, kiuj volis rilati senpere kun la ĉefoj, alportis ĉe ni multe da konfuzo. Ili ne bone komprenis aŭ tute simple nesciis la fakton, ke la funkcio de la ĉefo estas pure honora, eĉ teoria, ĉar li nek estras armeon, nek enspezas impostojn. La Amerikanaj historiistoj tiom pli bone eraris, ke ili neniam rimarkis nian demokratian sistemon — veran popolan registaron, reĝimon de persona libereco kaj rajtegaleco por ĉiuj membroj. Je la malnova tempo ekzistis neniam vera konfederacio. La kunligo de la Iroquois okazis post la alveno de la Eŭropanoj. Ili vive sentis la bezonon unuigi por komuna defendo. Sed ekzistis nek imposto, nek federala registaro en la preciza senco de tiu vorto. La celo estis nur amika kunigo, kies membroj de tempo al tempo kunvenis por diskuti la demandojn de komuna politiko kaj defendo kontraŭ la invadantoj. Pli malfrue, la Apalaches starigis multe pli fortan konfederacion, sed pro manko de la necesa materia apogo, ili iom post iom disiĝis kaj estis ekstermataj. Poste ankoraŭ, la Algonquins de l'oriento, estritaj de la fama Pontiac, provis organizi fortan ligan por sia defendo, sed iliaj klopodoj ankoraŭ pli malsukcesis ol tiuj de siaj sudaj fratoj.

La Dakotas aŭ Sioux estis naturaj amikoj, sed tuj kiam ili batalis kontraŭ la blankuloj, la dissolviĝo sekvis. La bandoj disiĝis unu post la alia, ĝis kiam restis nur grupeto de bravuloj por la lasta rezisto. La kaŭzo de tiuj ripetitaj malsukcesoj estis ĉiam la sama: manko de centra organizo sufiĉe subtenata de la gento. La sola vera registaro estis tiu de la klano, kiu ĉiam restis, sed ĉar la ĉefoj kaj konsilantoj postulis nenian alian rekompencan de sia servado, ol honoron, facile estis zorgi pri tiuj « regantoj ». Okazis grandaj kunvenoj por konkludi traktatojn aŭ plenumi religiajn solenaĵojn, kaj tiam oni rimarkis moron, kiu iel similis imposton. En tiuj okazoj, oni kutime petis maljunulojn sidi en konsilantaro kaj starigi regularojn de ĝenerala intereso. La regularoj pri la ĉiutaga ĉasado estis tre severaj kaj regula servo de rekogneskoj celis eviti la danĝeron de ĉiu surprizo. La homoj, kiuj tiamaniere servis la komunumon, rajtis interŝange ricevi la nutraron. Ĉiutage oni disdonis ruĝajn bastonetojn: ĉiu homo, kiu ricevis unu, devis, en donita tempolimo, porti certan kvanton de kuiritaj legomoj al la kaĵuto de la konsilantaro.

De la infaneco la Indiano lernis konsideri la publikajn servojn kiel grandan honoron; sekve oni ne bezonis lin petegi por akceptigi de li la plej danĝeran aŭ malfacilan taskon. Por tiuj gravaj laboroj oni elektis virojn kun fortika korpo kaj pura vivo. Antaŭ ĉio oni deziris religian homon, kiu ŝatas la Nevideblan Bonecon kaj en sia konduto celas nur plenumi la volon de la « Granda Mistero ». La konsilantaro agis kiel tribunalo por juĝi pri la maloftaj mortigoj aŭ la aliaj krimoj. La kulpulo povis esti ekzilita aŭ liverita al la familio de la viktimo por revenĝo.

Por pli malgravaj krimoj oni havis aliajn diversajn punojn aŭ la militkamaradoj de la kulpulo detruis lian domon aŭ liajn armilojn. Sed eĉ tiuokaze la afero povis esti decidita nur de la konsilantaro.

D-ro Ch. A. EASTMANN (Ohijesa).

(Amherst, Usono).

Trad. (1), A. R.

La geedziĝaj moroj ĉe la Siberiaj Burjatoj

En nia Trans-Bajkala regiono (*Zabajkala Oblast*) estas loĝantaj kozakoj (ĉirkaŭ 180 miloj), kamparanoj vilaĝanoj (ĉirkaŭ 150 miloj) kaj nomadaj indiĝenoj (ĉirkaŭ 170 miloj). El tiuj nomadoj la plej multombra parto estas « burjatoj », proksimume 135 miloj. Ankaŭ en Irkutska regiono estas multe da burjatoj, proksimume 135 miloj. La Burjatoj estas parencoj kun la Finoj kaj kirgizoj kaj estas branĉo de mongola raso. Plejparte ili estas brutedukistoj, nomadoj, idolistoj, kaj nur kelkaj el ili estas alligataj al iu loko, kaj, kiel ekz. en Irkutska regiono, terkulturas; kelkaj kristaniĝis. La burjatoj de Irkutska regiono estas idolistoj fetiĉistoj, tiuj de Trans-Bajkala regiono estas idolistoj budhistoj (« lamaitoj » — t. e. budhismo malpurigita, ŝanĝita per « lamaoj » — oferistoj).

Ili havas multajn strangajn kutimojn kaj morojn. Sed tie-ĉi mi diros nur kelke da vortoj pri iliaj geedziĝaj moroj.

La virinoj ĉe nomadoj estas sklavinoj, sed ne amikinoj, precipe ĉe la burjatoj. Tie la virino ĉion faras, ŝi ne nur mastrumas, sed hakas lignaĵojn, selas al edzo la ĉevalon, se li rajdas (ili estas bonegaj rajdantoj, kaj ili eĉ dormas rajde); ŝi apudiras piede; li do nur fumas el tabaktubeto, tetrinkas aŭ brandodrinkas. Ili aĉetas edzinojn; por akiri ili pagas per mono aŭ per brutaro al ŝiaj gepatroj. Tia pago estas nomita *Kolim*. Kaj tiu-ĉi *Kolim* estas tre malfacila kaj malriĉiganta por la edzoj. Ĉe la burjatoj en Irkutska regiono *Kolim* estas nekredeble granda; okazas tre malofte ke la edzo pagas kiel *Kolim* 200-300 Sm. kun aldono de kelkaj brutoj (ŝafoj, ĉevaloj, bovoj), sed plej ofte *Kolim* egalas ĝis 500, 700 kaj eĉ 1.000 Sm. Se dezirus edziĝi la malriĉa burjato, li dungigas kiel servisto por laborgajni la bezonatan monsumon, aŭ li prunteprenas pro grandaj procentoj monon por pagi la *Kolim'on*.

Tre ofte okazas la revendo de filino; mezriĉaj burjatoj revendas sian filinon dufoje, trifoje. Tio fariĝas jenamaniere: edzinigante sian filinon unuan fojon, la patro burjato prenas de la edzo *Kolim'on* je la sumo da 400-500 Sm. kaj 20-30 brutoj (bovoj, ĉevaloj). Pasas unu jaro; la patro inspiras la edzinigintan filinon sekrete forlasi la edzon; ĵafoje la « bona » filino forlasas la edzon kaj kuras al la « bona » patro; tiam la patro rapide edzinigas ŝin je alia edzo, antaŭe preninte de li grandan *Kolim'on*; post jaro aŭ pli la filino forlasas la duan edzon, kuras al patro kaj tiu lasta vendas ŝin pro bonega *Kolim* al tria edzo.

La unuaj du edzoj per juĝo postulas de l'« bona » patro pagi al ili la elspezojn, redoni *Kolim'on*, sed kiu scias pri la kancelariaj malhelpaĵoj, malfacilaĵoj burokraciaj ĉe la burjatoj, tiu mem divenos, ke ne ĉiu burjato estos postulanta

(1) El la raportaro ĉe la 1-a. Universala Raskongreso. La verkinto de tiu raporto mem estas Indiano.

per la juĝo la redonon de elspezoj : serĉante la veron, la burjato mem nur multe elspezos, kaj ne ĉiam li trovos ĝin.

Mia vilaĝo estas ĉirkaŭita de burjataj « ulusoj » (« uluso » estas « jurto » ; « jurto » estas kabano el felto aŭ arbŝelo ; do niaj burjatoj nun loĝas en rusaj dometoj el ligno). Burjatoj kiel nomadoj somere loĝas en unu uluso, vintre en la alia.

Nune ili ne havas tiel multe da vastaj valoj por migro, kaj vole-nevole grade ili kutimas alligiĝi al iu sidloko, ĉar la rusaj kamparanoj ne lasas al ili siajn kampojn kaj valojn. La rusa registaro ankaŭ normigas kaj niveligas la vivon de la Burjatoj, por ke ili ne ĝenu la rusajn kozakojn kaj vilaĝanojn.

Pastro In. SERIŠEV. (Subdel. Krasnij Jar.).

INDUSTRIO

Nova grava Sud-Amerika fervojo

La oriento de Brazilujo, de la Ekvatoro ĝis la ekstrema sudlimo, baldaŭ fervoje interrilatos kun la ĉila haveno Valparaiso. Efektive, la Brazila registaro estas konstruanta relvojn de Pirapora, en la ŝtato Minas Geraes, ĝis Belem, ĉefurbo de la ŝtato Para, sidanta proksime al la enmariĝo de la Tocantinas. kiu tra ŝpirebla delto, estas kunigata kun la riverego Amazonas. Pirapora estas la ekstrema stacio de la Brazila Centra Fervojo, jam en rilato kun Montevideo, ĉefurbo de Urugvajo, per aliaj linioj. Ĉi tiu urbo sidas apud enmariĝo de la Plata, sur kies kontraŭa bordo komenciĝas la fervojo de Buenos-Ayres al la ĉila marhaveno Valparaiso. Certe la distanco estas multe pli longa ol tiu tra Peruo, sed ĝi estas pli homplena kaj tial preferinda por fervojaro. Do, oni povos baldaŭ vojaĝi de la Amazonas ĝis Pacifiko, ne plu bezonante ŝipiri sur Atlantiko.

Por prezenti al si la dimension de la tuta linio, oni konsideru, ke la rekta linio de Belem-Pirapora estas longa 1850 km. de Pirapora-Montevideo 1980 km., kaj de Buenos-Ayres-Valparaiso 1.300 km., entute 5.130 km, proksimume. Ĝi do estos multe pli longa ol la linio de New-York-San-Francisko, sed la plimulto de relvojaj kilometroj rezultos el la neeviteblaj kurboj.

Ĝis la efektiviĝo de la tuta linio pasos jaroj, ĉar estas kalkulite, ke la konstruota parto de Pirapora-Belem postulos kvinjaran laboron, se oni povas ĉiujare fari 500 km. almenaŭ. Tiu laborego postulos kolosan kapitalon, kaj altpreza tarifo estos la konsekvenco. Oni jam diras, ke la fervoja veturo de Pirapora-Belem kostos 140 Sm., dum oni nuntempe pagas nur 35 Sm. de Rio-de-Janeiro al Pirapora.

Kiel mi jam diris, la lasta parto de la linio komenciĝos ĉe Pirapora. De tie ĝi iros ĝis la samnoma rapidfluo de la rivero Sao-Francisko, transpasinte ĝin, supreniros sur la akvodisigejon inter la Paracatu, kiun ĝi transpasos apud ĝia rapidfluo. Trairinte la rivervalon ĝis la Rio Preto, ĝi serpentumas laŭlonge de ĉi tiu por atingi la centran altebenaĵon, tuŝos la urbon Formosa, sidantan sur la ekstremo de la teritorio difinita al la estonta ĉefurbo de la Federacio, kaj daŭrigos al la fontaltaĵoj de la Parana pasante la urbon Palmas Etendiĝonte en la valo de Parana, ĝi alvenos al la Tocantino kaj sekvas laŭlonge de ĝia dekstra bordo ĝis la urbo Imperatriz, pasante la urbojn Porto-Nacional, Carlina kaj Boa Vista. De Imperatriz ĝi flankeniros al la fontaltaĵoj de la Capim, kies valon kaj poste tiun de Guama ĝi trairos kaj alvenos tiamaniere en Belem.

Komence la kapitalo aplikita por la konstruo apenaŭ donos gajnon, ĉar por transiraj ŝarĝaĵoj oni daŭros uzi la ekzistantan, malpli altprezan ŝipradon ; krom tio la ĉirkaŭaĵo estas plejparte senhoma. Sed la tuta lando tuj profitos el la linio, kiu kompletigas la relvojan reton por pli rapida plenumo de administraj, kaj startegiaj aferoj. Fervojan vojaĝon de la Amazonas Valparaiso, kiu iam estis preskaŭ

neefektivebla kaj estus daŭrinta jarojn, oni estonte povos facile fari en kelkaj semajnoj. Post malfermo de la vasta kaj kulturebla teritorio al la homo aktiveco, la entreprenota konstuo ankaŭ fariĝos profitiga. Ĉiokaze ĝi estos grava elemento de progreso por Sud-Ameriko.

F. E. THIERRACK,
(Del. Sao-Leopoldo).

IDEOJ & FAKTOJ

Reformo de la nutrado

La tago-post-taga pligrandiĝo de la nutraĵprezoj, kiuj precepe en la malpli multe progresintaj landoj ĉiam pli malfaciligas la vivadon de la plej larĝa parto de la loĝantaro, kaj la plej modernaj rezultatoj de la esploroj de la nutraĵa higieno, kiuj, dank'al la popularigo de la sciencoj ne restas plu sekreto de la sciencista kasto, paralele metas antaŭ la publika atento la grandan demandon pri la nutraĵa reformo. Kion la Vegetarista movado en sia rondo jam de longe deklaris, tion eksonigas voĉoj ekster ĝi ankaŭ : ke la ekonomian principon oni devas enkonduki ankaŭ en la nutradon, por tie ankaŭ « akiri plej bonan rezultaton per plej malmulte da elspezo ». La eksperimentoj de la dana kuracisto *Hindhede*, brile montras, ke tiu problemo estas bone solvebla, eĉ ke nin nutrante plej ŝpare — t. e. manĝante malmultekostajn manĝaĵojn kaj nur tiom, kiom estas nepre necesa — la higienan postulaton ni pli bone plenumas, ol per la kutima malŝpara maniero. Kvankam tute ne sur vegetara fundamento, sed nur ekonomia, *Hindhede* alvenis al la principo de la Vegetaristoj — nur, ĉar la viando por multe da mono donas al ni malmulte da nutrovaloro. Nur flanke li rimarkas kelkajn higienajn malpreferaĵojn, kiuj troviĝas precipe ĉe malpli multekostaj viandoj.

La laboradon kaj praktikajn rezultatojn de *Hindhede* ebligis la pli novaj esploroj de la scienco, kiuj konstatis, ke proksimume triono de la albumeno estas nepre necesa por la homo, kiel parto de lia po-taga manĝaĵo. Ĉar la scienco opiniis la viandon necesa, nur por ke ni povu ricevi la grandan kvanton de la nitrogenenhava nutraĵo, t. e. 118 gramojn, kio faras la kvinonon de la po-taga nutrovaloro : (tio estas neebla sen viando, aŭ malfacila). Post la rezultatoj de pli precizaj esploroj ĝi fariĝas tute nenecesa, ĉar 60 gramoj da albumeno, do unu dekono de la ĉiutaga nutraĵo, estas pli ol necesa, kaj tiu kvanto sufiĉe estas liverata de la plej malmultekostaj manĝaĵoj vegetaĵaj. Se ni rigardas la necesan kvanton de la anorganikaj saloj, la pli malmultekostaj manĝaĵoj estas el tiu vidpunkto eĉ pli bonaj, ol la viando kaj la pli rafinitaj manĝaĵoj, kaŭzoj de multaj malsanoj.

Hindhede staras sur la fundamento de jenaj postulatoj : ĉiutage ni konsumu 2 500 kaloriovaloran manĝaĵon kaj maksimume 60 gramoj el tio estu nitrogenenhavaj — plu manĝi estas malekonomia kaj eĉ malsaniga. Se ni klopodas ĉi tion plej malkare kunmeti, la pluaj postulatoj aŭtomate plenumiĝas. Li konsilas precipe tri specojn de manĝaĵoj : grenojn, en formo de kaĉaĵoj kaj pano, terpomon, kaj buteron, ĉu naturan ĉu artefaritan, laŭ volo kaj gusto. Fruktojn, legomojn, sukerojn, spicojn k. c. li aldonas por gustigo kaj variigo, kio ja estas ankaŭ necesa.

Li donas en sia libro, krom la teorio ankaŭ praktikajn instruon, kaj receptojn kaj alvenas al la grava rezultato, ke, laŭ la prezoj en Danujo, el la potaga sumo de 0,15 — 0,18 Sm. oni sen ia manko povas vivi kaj labori, kaj se oni ofertas 0,25 — 0,35 Sm. po persono kaj tago, ĉiutage abunde ni povas al ni liveri forton kaj sanon en formo de bongustaj nutraĵoj, se nur ni akceptas kaj sekvas lian sistemon. Lasu ni paroli lin mem en la antaŭparolo :

« 1. Mi volas instrui al la homo, kiu havas 5.000 Sm. da jara enspezo, ke li povas multe pli sane vivi ol li nun faras.

« 2. Mi volas instrui al la homo, kiu havas 1500. Sm. da jara enspezo, ke li povas multe pli malmultekoste vivi ol li nun faras. Estas tute nenecese elspezi po tago 1/2 ĝis 1 Sm. por nutrado : oni povas tute same bone, eĉ pli bone vivi por 0,25 ĝis 0,35 Sm.

« 3. Mi volas instrui al la homo, kiu havas nur 400-600 Sm. da jara enspezo, ke li ne devas malsati, se eĉ li nur 0,15 — 0,18 Sm. povas elspezi por manĝo po tage. »

Dekkvin-jara praktika eksperimento pruvis la ĝustecon de lia sistemo, t. e. li vivis laŭ tio dum tiu tempo. Liaj registaro kaj samregnanoj komprenis la profitojn de tio kaj helpas lin. Ni ne bezonas insisti pri la profito de tiu sistemo por la ĝenerala kulturo : la jara enspezo de miloj da familioj altiĝus je duono aŭ triono, kaj la ŝparata parto de la enspezo estas uzebla por pli altaj bezonoj : pli bona loĝaĉo, pli bona eduko de la infanoj, pli da kulturbezonoj kontentigeblaj. Se ni aldonas la profiton en sano, en pli granda laborkapablo, en progresanta inklino al pli altaj vivceloj — kion *Hindhede* tre serioze asertas en sia libro — ĉiu homo devas konsideri, ĉu li ne fariĝu Hindhedeano (1).

R. RAJCI (Del. Debreczen).

La muŝoj, transportantoj de infektaj malsanoj

La scio, ke multaj infektaj malsanoj ĉe homoj kaj bestoj povas transportiĝi per kuloj estas certa sperto de la moderna patologio. Tiu ĉi maniero de infektado estis multe studata kaj nun estas pruvite, ke per kuloj kaj aliaj parencaj insektoj, pikintaj la malsanulojn, disvastiĝas la infektoj, nome malvarma febro, flava febro, afrikana dormemo kaj aliaj tropikaj malsanoj. Tiel same estas esplorite, ke puloj precipe la rata pulo (*pulex cheopsis*) kunagas je la disvastigo de la pesto.

Oni ankaŭ konstatis, ke nia ordinara ĉambra muŝo povas transporti multajn malsanojn. Tiuj spertoj estas precize traktataj en multaj anglaj kaj francaj raporto, kaj en tiu ĉi artikoleto koncize resumitaj :

Nuttal kaj Jepson diskutis la demandon pri la rolo de la ĉambra kaj aliaj nepikantaj muŝoj je la disvastigo de diversaj infektaj malsanoj. Oni ankaŭ supozis, ke la ĥolero transportiĝus per la muŝoj, kaj epidemiologiaj observoj kaj eksperimentoj tion atestas. Tiel Uffelmann metis la muŝon, kiu troviĝis sur kulturo de ĥoleraj infektiloj en glason enhavantan steriligitan lakton. Kiam la muŝo ĉesis trinki, li skuadis la lakton por ke la mikroboj egalmezure disiĝu ; el tiu ĉi lakto ekkreskis cent kolonioj de ĥoleraj vibrianoj.

Poste Ganon pruvis ke la muŝoj ŝargitaj per ĥoleraj vibrianojn povas ankoraŭ post 24 horoj transporti la infektilojn. Similaj eksperimentoj estis farataj kun aliaj malsanoj precipe kun la tifo. Ankaŭ ĉe transportado de la tuberklozo estas kulpaj la muŝoj. Por plua determino de la rolo de la muŝoj en suprediritaj cirkonstancoj oni studis iom de muŝa biologio. Coppmann, Howlet kaj Meriman esploris unuavice ĝis kie ĉambra muŝo povas flugi. Oni ŝmiris grandan nombron de muŝoj per kolora kreto kaj lasis ilin forflugi ; post 24 horoj oni trovis kelkajn en distanco de 300 ĝis 1.700 metroj, laŭ la ventoforto. Plie oni trovis unu muŝon en 10 minutoj ; alian en 35 minutoj post elflugo je distanco de 800 metroj.

Oni esploris ankaŭ ĉu la muŝoj povas disporti la ovojn de la parazitoj kaj oni pruvis ke la ovojn de la tenioj povas eniĝi en intestoj de la muŝoj kaj aperi en ĝiaj ekskremento. Larvoj de la muŝoj povas eniĝi la ovojn de askaridoj, kiuj en la korpo de muŝoj mem evoluas.

W. Nicoll kaj E. Hart esploris ke la ovojn de la tenio povas dum tri tagoj persisti en intestoj de la muŝo taŭgaj por vivo.

Fine G. Smith en lasta tempo esploris kiamaniere arte infektitaj muŝoj povas transporti la infektilojn kaj li ankaŭ trovis ke tiuj insektoj povas infekti lakton aŭ siropon dum ili ĝin manĝas. Tiel unu muŝo kaŭzis dum tri tagoj amasan infekton de bacilo « prodigiosa » aŭ buc. antraksa, ankaŭ post dek tagoj kvankam pli malgrandan.

El tio rezultas ke ni peni ne nur la kulojn sed ankaŭ la muŝojn nepre ekstermi.

Trad. (1) : D-ro A. G. (Lisko).

NOTOJ

*. La firma Krupp partoprenos en la Universala Ekspozicio de San-Francisko. Interalie oni intencas starigi ĉe la « Ora Pordego » marbordan defendadon. Okaze de la malfermo de la Panama kanalo la sama firma aranĝos apartan ekspozicion de pormilita materialo. Specialan allogaĵon prezentos perspektiva turo, kiu superos la altecon de la Eifelturo. Statuo de la libereco kronos ĝin. La Essen'aj laborejoj liveros parton de la materialo. Same la akeia societo Zeppelin forsendos al la ekspozicio du aeroŝipojn, kiuj de la ekspozicio entreprenos grandajn komunajn vojaĝojn. F. P. (Essen).

*. Kunsido de la Internacia komisiono de la petroloj malfermiĝis en Vieno. Partoprenas en ĝi la delegitoj de la plimultaj Eŭropaj kaj Amerikaj ŝtatoj.

*. La Internacia konferenco de la fervojoj destinata por starigi fiksaĵojn kaj samajn regulojn por la pasado de la vagonaroj ĉe la landlimo, precipe pri tio kio koncernas la pakajojn, dogankontroladon, k. t. p., ne povos okazi printempe, kiel oni esperis. La juraj studoj necesaj por la pritrakto de tiu demando postulas multe da tempo. Interalie oni intencas anstataŭigi la duoblajn stacidomojn internaciajn per unikaj landlimaj stacidomoj, kiuj prezentos grandan profiton por la vojaĝantoj kaj la komercaĵoj. La svisa registaro preparas la programon de tiu konferenco. J. G.

*. Laŭ la lasta denombro de la loĝantaro de Italujo atingas 34.686.653. (En dek jaroj ĝi kreskis je 2.211.400). La plej loĝataj urboj estas : Napolo (709.376) ; Milano (602.236) ; Roma 516.790 ; Torino (418.666).

OKAZONTAĴOJ

Aprilo. — Sepa internacia kongreso por Tuberklozo en *Romo*. *Majo* (7-17). — Naŭa internacia konferenco de la ruĝa kruco en *Washington*.

Majo. — (26-28). — Internacia konkurso de muziko en *Parizo*. *Junio* (28-1 jul.). — Sesa federala festo de la Sokoloj (gimnastikistoj), en *Praha*.

Julio (22-1 aŭg.). — Internacia kurso de komerca disvastiĝo en *Antverpeno*.

Aŭgusto. — Internacia kongreso de antropologio en *Genevo*. *Aŭgusto*. (6-12). — Internacia kongreso de medicino en *Londono*. *Aŭgusto* (22-27). — Internacia kongreso por Morala Edukado en *Hago*.

Septembro. — Sepa ĝenerala kunveno de la internacia unuiĝo por leĝa laboristprotektado en *Zurich*.

Aprilo-Septembro. — Bavara Ekspozicio en *München*.

Por pliaj informoj, la Esperantianoj sin turnu al la Delegitoj de U. E. A. Ĉiuj delegitoj bonvolu nin informi pri la kongresoj, festoj, manifestadoj okazantaj en ilia regiono.

(1) La libro krom la dana originalo aperis ankaŭ germane sub la titolo : *Mein Ernahrungs-System* (W. Vebach kaj Co, Berlin). Ĉu ne estus dezirinde, ke baldaŭ aperu ĝi ankaŭ en Esperanto ?

(1) El « Das Oesterreichische Sanitätswesen ».

ESPERANTISMO

AL NIA LEGANTARO

Ni rememorigas al niaj legantoj, ke ni deziras la kunlaboradon de kiel eble plej multaj samideanoj por la redakto de la rubriko « Esperantismo ». Ne necese estas skribi leterojn : plej ofte sufiĉas poŝtkarto. Ni plezure enpresos ĉiujn informojn pri nia movado, sed kompreneble ni devos kelkfoje resumi, ĉar mankas al ni loko. Ni rekomendas al helpontoj la precizecon ; ili bonvolu indiki la daton de ĉiu fakto (parolado, kurso, k. t. p.), la devenon de ĉiu informo. Por artikoloj en naciaj ĵurnaloj oni sendu al ni, se ne la ĵurnalon mem, almenaŭ ĝian titolon kaj daton, la nomon de la urbo, kie ĝi aperas, kaj resuman enhavon de l'artikolo. Plue, kiam komitato organizas nacian aŭ provincan kongreson aŭ eĉ feston iom gravan, estas konsilinde konigi al nia redakcio kiel eble plej frue la daton kaj programon de tiu okazantaĵo. Tiel reklamo ne estas vana por ja sukceso. Senutile diri, ke ni poste danke ricevos iom detalan raporton pri tiaj manifestadoj de nia vivado. Ĉiuj korespondantoj devas alveni antaŭ la 12^a kaj 27^a de ĉiu monato al la adreso : « Esperantio », rue de la Bourse, 10, Genève, Svislando.

KRONIKO

Novaj grupoj kaj Societoj. — En *Winterswyk* (Nederlando) fondiĝis nova grupo. — G. G. S.

En *Göttingen* (German.), la esp. Unuiĝo « Espero » kun 9 membroj. — H. S.

En *Portland*, Maine, Usono, Portlanda Esperanta Societo, D-ro Dana W. Fellows, Prez. Herbert Harris, Sek., enhavas 61 membrojn kaj estas la plej prospera societo en ŝtato Maine. Ĝi kondukas kvar kursojn kaj presigas oftajn propagandajn artikolojn en ĉiutagaj ĵurnaloj. Nun ĝi komencas varbi por U. E. A.

Novaj kursoj. — En *Funŝal* (Insulo Madejro), de S-ro Proenca kiu publikigis bonajn artikolojn en loka gazeto. — D'A.

En *Göttingen* (German.) post la parolado de S-ro Reinking. — H. S.

En *Winterthur* (Svisl.) gvidata de D-ro Strassen, 30 gelerantoj. — S.

En *Edimburg* (Skotl.), S-ro Pringle, kun 30 lernantoj.

En *Bochnia* (Galicio, Aŭstrio) finiĝis du kursoj : ĉe la pola societo por memlernado « *Lycie* » (La Vivo), kun 8 partopr., kaj en la gimnazio, kun 16 partopr. Nova malfermiĝos en februaro.

En *Wisnicz nowy* (Galicio) D-ro I. Fragner finis siajn lecionojn kun 18 lernantoj.

En *S-ta Coloma de Farnès* (Hispan.) du kursoj, kun pli ol 50 gelernantoj. — V. L.

En *Striegau* (Silezio, German.) post du paroladoj, S-ro E. Schulz (Schweidnitz) malfermis kurson kun 27 partoprenantoj, en komercista unuiĝo « *Hansa* ». — E. S.

En *Pardubice* finiĝis per festeto la 21 dec. trimonata kurso de D-ro S. Schulhof; notinde estas, ke el 48 komencintoj, 45 restis ĝis la fino fidelaj. — S.

En *Lisbono* (Portugal.) ĉe la Kristana Unuiĝo de junaj Viroj. — B.

Kunvenoj kaj festoj. — En *Peterburgo*, la 9 de dec. unua foje kunvenis la esp. societo en la salono de la societo « *Laboro kaj kulturo* » ; prezidis S-ro Evstifeieff. Oni diskutis la regularon kaj kotizajon. La kunvenoj okazos ĉiumarde. — E. R. P.

Foëcy (Cher, Franc.). — Lastan tagon de l'jaro, granda esperantista-kristnaska festo, donita de Sinjorino la Grafino de Prez en ŝia kastelo de Foëcy, kunigis pli ol 150 geinfanojn, kaj iliajn gepatrojn. La arbo, kiu pinto ornamita de la

verda standardo estis ĉirkaŭita de ĉiuj esperantistoj de Foëcy, kiuj, rondirante, tutkore kantis « *La Espero* ».

Dum la festo, sinjorino Marie Gen faris al la geinfanoj interesan paroladon por ilin inviti al la lernado de Esperanto ; la junuletoj tre ĝojis pri la invito, kaj multaj volis tuj aliĝi. Disdono de donacoj kaj infana balo finis tiun feston. La lokaj ĵurnaloj longe raportis pri tiu neordinara festo.

Bromberg. — La 16 dec., la grupo renovigis sian komitaton. Prezidanto estas S-ro D-ro Kandt. Oni decidis aliĝi al U.E. A. kiel entrepreno. Tri kursoj estas organizitaj : ĉe la Bontemplanoj ; unu ĝenerala kurso ; alia por sinjorinoj. — S.

En *Antverpeno*, nova estraro elektita la 1-an, de januaro : Prezidanto : Prof. A. Vermandel ; Sekr. S-ro Ing. A. Van Meerbeek, Sterlingerstraat, 142, Borgerhout. — V.

Zamenhofa Datreveno. — Multaj grupoj rememorigis per festetoj la datrevenon de nia majstro. Jen kelkaj ricevitaj raportoj :

En *Rio-de-Janeiro* pli ol 150 personoj ĉeestis la solenan kunvenon en la grava « *Brazila Geografia Societo* ». Deputato S-ro Correia Depreitas, D-ro V. Silva, kolonelo Moreira Guimaraes, D-ro Backheuser, D-ro Hernani Mendez kaj aliaj paroladis. Poste, oni vidis la filmojn de la Sepa kaj finis la feston per gaja festeno. — I. O.

En *Hago* (Nederlando) 16 dec., granda neesperantista ĉeestantaro ; kantoj, kaj propaganda komedioto verkita de F-ino N. Boon kaj tre aplaudata. — H. C.

En *Voronej* (Rus), 15 dec. la esp. sekcio de la Societo de popolaj Universitatoj ; oni sendis al D-ro Zamenhof gratulan leteron. Multaj paroladoj post la festeno, pri Esperanto kaj Esperantismo. — G. V.

En *Lisbono* (Portugal.) 15 dec. ; elokventaj paroladoj de S-roj Santos Gil kaj R. Horner. Poste, esper. kantoj kaj lumbildoj pri la Sepa. Bona sukceso. — D'A.

En *Brisbane* (Aŭstralio) ; La festo estis samtempe la unua esperantia kunveno de la membroj en tiu urbo (15 dec.). — P. P.

Paroladoj. — En *Göttingen*, 4 febr. parolado de S-ro juĝisto Reinking. — H. S.

En *Edinburgh* (Skotl.), propaganda parolado kun lumbildoj ; 200 personoj. — P.

Pri U. E. A. sukcesplene paroladis S-ro Blaise : la 1 de Dec. ĉe la *Londona Klubo*, la 7. ĉe la *Cercle Français de Soho*, kaj la 13. ĉe la *Battersea* grupo, la 22. ĉe la *Liverpool Esperanto klubo* ; ĉie li montris la utilecon de nia Asocio. — B.

Paroladvojaĝo Privat. — Dum januaro S-ro Privat paroladis en *Praha* antaŭ 30 Esperantistoj, en *Dresden* antaŭ 300, en *Breslau* antaŭ 80 esperantistoj, kaj poste france antaŭ 100. Tie tuj kolektiĝis 26 novaj aliĝoj. La gazetoj en *Lodz* (Polujo) anoncis lian viziton kaj paroladon. — B.

Paroladvojaĝo Parrish. — Parolado en *Beaune* (Franc.) ĉe la Kinoteatro, la 11 de januaro, sub la patronado de la komerca Ĉambro. Ĉeestis ĉirkaŭe 400 personoj. Tramveturante Svisujon, S-ro Parrish parolis la 16 januaro en *Neuchâtel* dufoje antaŭ 300 personoj, la 17 en *La Chaux-de-Fonds* kvarfoje antaŭ 1.350 personoj, en *Le Locle* 18 januaro antaŭ 1.200. — G.

Esperantiaj Distriktaj kunvenoj. — *Londono* — La distrikta kunveno okazis la 5. januaro, sub la prezido de S-ro Blaise. La distrikta Del. klarigas la kialon de la kunveno kaj deziras, ke dum la jaro estu organizata granda propagando per paroladoj ĉe la Esperantistaj kaj neesperantistaj societoj, per gazetartikoloj kaj vizito al komercistoj. Estas

do akceptite, ke S-ro Blaise faros paroladojn ĉe la diversaj kluboj de Londono kaj de la ĉirkaŭaĵo; same S-ro Kaliski. S-ro Kaliski parolas pri la fondo de Esperanto-Oficejo kun pagata oficisto en la Civito, sed pro manko de mono, kvankam ĉiuj konsentas pri la utileco de tia Oficejo, oni decidas forlasi tiun projekton ĝis pli malfrue. Oni principe akceptis, ke la diversaj Subdel, sendu ĉiutrimonate raporton al la distrikta Del. pri sia agado.

Regionaj Esperantiaj kunvenoj. — *Saint-Etienne.* — La Esperantia kunveno okazis la 20. decembro. S-ro Gabert prezentis sian raporton kaj konigis la diversajn progresojn de U. E. A. plenumitajn dum la jaro. Li konkludis, esprimante la deziron, ke ĉiuj Esperantianoj klopodu helpi la disvastiĝon de nia Asocio. La raporto estis unuanime akceptata.

Krefeld. — Ĉe la kunveno okazinta la 4. januaro, S-ro Borgermann raportis pri la agado U. E. A., la decidoj de la Kongreso kaj la kreo de fakaj asocioj. La kunveno akceptis lian raporton kaj voĉdonis la decidon, kiun oni trovas en la rubriko « Organiza demando ».

Braunschweig. — La Esperantia kunveno aprobis la raporton de F-ino Jahns, Delegitino, kiu speciale raportis pri la fondo de la fak-asocioj. S-roj Reinking kaj Kraft rakontis pri siaj spertoj faritaj en la lasta jaro per la helpo de U. E. A., montrante la malkarecon de la kotizoj kompare kun la ebla profito kaj la senpaga ricevo de la valora jarlibro.

KRAKOVAJ KONGRESOJ

Dua Cirkulero de la Loka Komitato :

La laboroj de la Organiza Komitato rapide marŝas antaŭen.

Multego de ĉiutage ricevataj korespondadoj kun informpetoj, konsiloj kaj proponoj montras, ke la Oka vekis viglan intereson inter la ĉiulandaj gesamideanoj.

Aliĝoj. — La Komitato eldonis aliĝilojn, kiuj estas senditaj al ĉiuj ĝisnunaj provizoraj aliĝintoj. — La Kongresa karto kosta Sm. 6¹ Post ricevo de aliĝo, akompanata da mono tuj estos sendita provizora kongreskarto kun definitiva numero. La unuaj kelcent aliĝintoj ricevas kune kun la provizora kongreskarto, kiel premon, la belegan esperantistan himnon (kun notoj) « La Tagiĝo » verkitan de S-ro A. Grabowski kaj malavare donacitan de S-ro. J. Günter redaktoro de « Pola Esperantisto ». Familianoj (edzinoj kaj infanoj) kune venantaj kaj kun la famiĉestro pagas nur Sm. 3 kaj ricevas suplementajn kartojn, sed la kongresajn dokumentojn ricevas sole la famiĉestro. Same geblieduloj pagas duonan prezon, sed ili plenrajte ĝuas ĉiujn privilegiojn de la Kongreso. La kongresa karto N-o 1, havas specialan karakteron, ĉar ĝi estos aukcie vendita. Ĝin ricevos tiu kongresano, kiu ĝis la unua de majo oferos por ĝi la plej altan sumon. Oni sendu proponojn.

Adreso. — La sola adreso de la Organiza Komitato estas : Kongreso Esperantista en Krakovo, Austrio-Galicio.

Loĝado. — La loĝigan sekcion efike helpas la urbestro, kiu metis je dispono de la Komitato riĉan materialon koncernantan ĉi tiun fakon. La preparaj laboroj de la aludita sekcio baldaŭ estos finitaj kaj ili povos en plej proksima estonto publikigi tarifon kun prezoj de loĝado kaj mangado. Ĉar ni ricevis de diverslandaj studentoj avizojn, ke la studentaro intencas grandare partopreni en la Oka kongreso ni zorgas por havigi al ili kiel eble plej malkaran loĝejon. Ni do sukcesis trovi por la studentoj agrablan hejmon, en kiu la loĝado dum ses tagoj kosta nur Sm. 4,25.

Oficiala helpo. — La organiza Komitato sendis konformajn petskribojn al ministerio por publikaj laboroj kaj ministerio por Galicio. La galicia ministro dum speciala aŭdienco firme promesis al la Komitato subteni ĝiajn klopodojn ĉe la aluditaj estraroj. Same estas sendita al la provinca parlamento petskribo pri monhelpo, kiun subtenos la krakova urbestro, Dro Leo, estanta samtempe provinca deputato.

Gvidlibroj. — Estas presataj gvidlibroj tra Zakopane kaj Tatroj,

kie okazos postkongresa ekskurso kaj speciala gvidlibro tra krakovaj preĝejoj, famaj pro siaj multenombraj artaĵoj. Laŭ sia eksteraĵo la ĉiuj gvidlibroj similos la gvidlibron tra Krakovo.

Akceptejoj. — Por arango de akceptejoj kun apartenaĵoj (skribotamburo, leĝejo, poŝtoficejo, vestejo, lavejoj, k. t. p.), de ekspozicio kaj vendejo la Komitato ricevis la vastan kaj belegan konstruaĵon de Komerca Akademio, kiun la direktoro S-ro Kannenberg, granda amiko de nia movado bonvolis doni je dispono de la Kongreso.

Teatro. — Estos ludita « Mazepa » kortuŝanta tragedio de Juliusz Slowacki. La libron eldonis la firmo Hachette kaj Co, en Parizo, de kiu ĝi estas ricevebla por 0,80 Sm. La tragedion ludos la plej eminentaj aktoroj de krakova urba teatro.

Literatura konkurso. — Ni varme petas, ke bonvolemaj personoj, instigitaj de nia unua cirkulero, prokrastu sian intencon pri difino de temoj kaj premioj, ĉar pri tiu grava punkto ni donos interesajn detalojn nur en la plej proksima cirkulero.

Vojaĝo al Krakovo. — Ĉiu aliĝinto ricevas kune kun la provizora kongreskarto specialan tabelon de distancoj inter Krakovo kaj 30 plej gravaj urboj en Eŭropo kaj Azio. La tabelo montras detalajn prezojn de fervojoj (nur en unu direkto ne ire kaj rene !) kaj la daŭron de la vojaĝo.

Peto. — Fine grava peto al ĉiuj samideanoj, kun kiuj ni interrilatas pri kongresaj aferoj : Ili ne prokrastadu siajn respondojn kaj tiamaniere ne malfruigu niajn laborojn, memorante la anglan proverbon : « Time is money ».

LOKA ORGANIZA KOMITATO.

DIVERSAĴOJ

∴ *Monhelpo.* — La Komerca Ĉambro en Angers voĉdonis la 16 januaro monhelpon da Sm. 20 por la loka Esperantista Grupo. Grava estas precipe la morala flanko de tiu subteno. — H. M.

Same, la urbestro de S-ta Coloma de Farnès (Hisp.) donacis al la grupo monhelpon da 30 Sm. La sumo estas sufiĉe grava, se oni konsideras la krizon, kiu trafis la urbon, kaj la malmultecon de ĝia loĝantaro (4.000). — A. L.

∴ *La popolsumigo en Aŭstrio* (1910). Tio estas la titolo de broŝuro eldonita de la « Bohema nacia konsilantaro » ; ĝi aperis france en la n-o 11 de la franca gazeto « Courrier Européen ». Ĉar ĝi traktas pri intergentaj rilatoj, ĝia enhavo estas leginda. Senpage havebla de « Narodni Rada ĉeska », adreso : 1. Frantiskovo Nabrezi, 10, Praha (Aŭstrio). — P. kaj K.

∴ *Propagando.* — En Accrington (Anglujo) la Del. kaj Vic-Del. laboras en la Korporacia Tramvoja Oficejo, kaj tion profitas propagando. Jam multaj tramistoj interesiĝis pri nia lingvo kaj ĝin eklernas. — E. R.

∴ *Ruĝa kruco.* — D-ro Yemans altiras la atenton de la tuta Esperantista Ruĝkruccano pri la internacia konferenco de la Ruĝa Kruco en Washington (Usono), la 7-17 de majo 1912. Gazetoj estas petataj represi tiun informon.

∴ *Pseŭdonimo.* — S-ro B. Martins d'Almeida informas siajn korespondantojn, ke por faciligi la elparolon de sia nomo, kiu en Esperanto estas alia ol en portugala lingvo, li decidis uzadi de nun en siaj internaciaj rilatoj la pseŭdonimon « Bemaldo ».

∴ *Vojaĝstipendio.* — Oni scias, ke ĉiujare la Burgonja Esperantista Federacio donas, post ekzameno, vojaĝstipendion da 120 Sm. Por 1912 tiu vojaĝstipendio estas aljuĝita al nia fervora Lyon'a samideano, S-ro Poncet, kiu plenumos sian peresperantan vojaĝon en Svisujo kaj Aŭstrio (ĝis Krakovo), en monato majo aŭ junio.

TRA LA GAZETARO

∴ *Germana Esperantisto* ĉesas esti la oficiala organo de G. E. A. Ĝi de nun aperos duonmonate, en aldonoj alterne propaganda kaj literatura.

«..... Pro la ĝisnuna interkonsentita abonprezo, kiu estas la duono de la ordinara, ne plu estis eble al ni liveri la gazeton al la membroj de G. E. A., se ni ne volas riski tro grandan malprofiton. Niaj traktoj kun G. E. A. pri tiu ĉi afero bedaŭrinde ne kondukis al kontentiga rezultato, tiel ke ni estis devigataj rezigni la oficialecon de nia ĵurnalo, ĝin nun anstataŭos « *La Esperantisto* » de S-ro Fritz Stephan. Ĉu estas bone, ke G. E. A. ĝuste elektis tiun ĉi gazeton, kies redaktoron ĝi ĝis nun pro certaj kaŭzoj forte kontraŭbatalis, tio estas demando, kiun nur la estonteco povos respondi..... ».

∴ *La Bontemplano* estas nova semajna gazeto por Esp. Bontemplanoj. Ĝi aperas kiel aldono de *Germana Esperanto-Gazeto*.

∴ *Internacia Pedagogia Revuo* reaperas en formo de okpaĝa bulteno.

∴ *British Esperantist* (Jan. 1912) reprenis angle la artikolon de nia kunlaboranto Verto pri « Esperanta Literaturo ».

∴ *Danubo* (Dec. 1911). Sub titolo « Internacia reprezentantaro », (R. Bollack) :

«... Ĝis nun la esperantistoj vivis trankvile, modeste sekvis la vojon celitan kaj la movado ĉiutage plifirmigis. Grava organizaĵo U. E. A. multe utilis por la praktika vivo (vojaĝoj, informoj) de la esperantistaro. Dank'al la sindonemo de la delegitoj, konsuloj de ĉiu loko, ĉiu esperantisto irante alilanden trovis, ĉe la unuaj, akcepton koran ĉiam, kaj ofte fratan. La utilo de U. E. A. estas ne-neigebla ; ĝiaj servoj estas nepre utilaj, ĝiaj delegitoj estas sindonemaj esperantistoj, senbrue plenumantaj malfacilan taskon. Ni devas konservi U. E. A. kaj ni ĝin konservos... ». Ni konservu U. E. A., aro de modestaj, fratoj kamaradaj ! Ni forlasu internacian « oficialan » reprezentantaron, kiu povas ĝojigi nur la ambiciulojn ! ».

∴ *Ondo de Esperanto*, kiu komencas sian kvaran jaron kaj ricevis diversajn plibonigojn, faras enketon pri la temo : ĉu bovbataloj (torokuroj) estas aprobindaj aŭ ne ?

∴ *Norvega Esperantisto* reaperis, kiel oficiala organo de Norvega Esperantistaro.

∴ *Le Travailleur Esperantiste* estas nova gazeto, grandparte en franca lingvo, kiu celas la propagandon de Esperanto ĉe la laborista klaso. (Adr. : 49, rue de Bretagne, Paris).

∴ Okaze de alproksimiĝanta kongreso en Krakovo, pola gazetaro donas propravole favorajn artikolojn kaj notojn pri Esperanto. La plej grava krakova gazeto *Nova Reforma* (Nova Reformo) presigis en pola traduko leteron de nia paroladisto, S-ro Parrish, kiun li sendis pri Krakovo kaj Polujo al la redakcio de l' « *Amerika Esperantisto* ». Simile favoras nian ideon aliaj ĵurnaloj krakovaj, precipe *Tygodnik Mienwraŭski* (Burĝa semajna gazeto) kaj *Goniec poniedriadkony* (Lunda gazeto). En du lastaj estas fiksa loko por esperanta fako ; inter aliaj estas presitaj du artikoloj pri praktika valoro de Esperanto kaj pri U. E. A., verkitaj de L. Kronenberg. Ankaŭ la ekstergalicia pola gazetaro informas siajn legantojn ĉiam pli kaj pli ofte pri Esperanto.

∴ En Caracas (Venezuelo), nia Del., S-ro Pastro Marcelo Maldonado sukcesis gajni al nia afero tri ĵurnalojn : *El Universal*, *La Nacion* kaj *El Heraldo Catolico*. Ĉi tiu lasta publikigas regule kurson de Esperanto. Krom tio ni ricevis dek kvin artikolojn aŭ anoncojn tranĉitajn el tiuj ĵurnaloj (precipe pri la ekspozicio malfermita la 1-an de januaro). Ni tiom pli gratulas tiun fervoran propagandiston, ke lia agado ne estas facila... nek faciligata.

∴ *Tacoma-News* (Tacoma, Usono) 12 Dec. : « Disvastigo de Esperanto ; ĝia utileco por vojaĝantoj ; U. E. A. » (de S-ro Lehman Wendel).

∴ En *O Paiz* (Rio de Janeiro, Brazil.), 17 dec. 1911, raporto pri la Zamenhofa festo kaj parolado de D-ro Moreira Guimaraes (kun portreto de l'Majstro).

∴ Ĉiudimanĉe *Osveta Lidu*, unu el la plej gravaj bohemiaj gazetoj, enpresas grandan esperantan rubrikon de D-ro Schulhof. Ĝi daŭras jam de unu jaro.

∴ En *El Sol* (Porlamar, Venezuelo), 2 dec., noto pri la nove fondita societo « *Amatoroj de Esperanto* », kies prezid. estas samtempe redaktoro de la nomita gazeto.

∴ « *Internacia Lingvo* », de S-ro E. A. Lawrence, en *The Labour Leader* (Londono), 16 dec. 1911 ; en la sama, 29 dec., alvoko de S-ro A. Deane al Socialistaj organizaĵoj. — G. H. L.

∴ S-ro Belenguer, Del. Teruel (Hispan.) publikigis en *El Mercantil* la ĉefartikolon de nia N-o 97 : « Zamenhof kaj Esperanto kiel edukantoj », de S-ro W. A. Vogler.

∴ *O Seculo* kaj *O Diario de Noticias* (Lisbono, Portugal), enpresis dum decembro kuraĝigajn priesperantajn artikolojn ; kelkaj estas tiritaj el nia gazeto. — S.A.

∴ *Le Moniteur de l'Oise* (Beauvais, Franc.), regule publikigas esp. kronikon ; jen kelkaj titoloj : « Esperanto kaj Ruĝa-Kruco » (12 dec.) ; « Senpaga kurso » (30 dec.) ; « Esp. kaj la societoj por soldatpreparado » (14-15 kaj 19 jan.). La aŭtoro estas S-ro L. Demarcy, ĝen. sekr. de la S. F. P. E.

∴ En *l'Eclairneur de Nice* (Nice Franc.), 11 dec. pri la propaganda parolado de S-ro Cresp.

∴ *Excelsior* (Parizo), 13 dec. raportas pri la parolado de S-ro Michelin ĉe la monata festeno de la Pariza Grupo, per kiu li anoncis, ke li donacas por nia propagando 8.000 Sin.

∴ *Le Journal du Creusot* (Le Creusot, Franc.), 14 dec. : cirkulero por la grupoj de la Burgonja Federacio ; raporto pri kelkaj festetoj.

∴ *Bayerische Verkehrsblätter* (München, Bavar.), 16 dec. dediĉas preskaŭ tutan paĝon al mallonga historio de nia lingvo.

∴ En *Weinbæhlaer Zeitung* (Weinbæhla, German.) 17 dec., nova knrso anoncata.

∴ *Le Phare Sténographique*, monata organo por Duployé-Stenografio daŭre batalas por nia afero. En la januara numero troviĝas, krom originalaj artikoloj, eltirajoj el « *Pola Esperantisto* », « *La Movado* », « *Franca Esperantisto* », « *The British Esperantist* », « *La Instruanto* », « *Esperanto* ». Redaktejo : 77-84 R. St-Sever, Rouen (Franc.). Jarabono : 4 frankoj (Sm. 1.60).

∴ *Le Cri d'Angers* (Angers, Franc.), 1 jan. « *La industrio de Hamburgo* » (el nia 3-a komerca Bulteno) ; 7 jan., de S-ro H. Muffang, raporto pri la paroladvojaĝoj de S-roj Privat kaj Parrish, sub la titolo « *Du apostoloj* ».

∴ *Priener Zeitung* (Prien, German.), 13 jan. : « *Esperanto kaj Turismo* ». — 14 jan. : pri la fondo de la loka grupo, alvoko al forestintaj kursanoj.

∴ *Beilage zum « Werdauer Tageblatt »* (German.) 16 janv., anoncas, ke ĉiusemajne ĝi enpresos esp. rubrikon kaj komencas tion per informoj pri historio kaj nuna stato de nia lingvo.

∴ En *La Bataille Syndicaliste* (Parizo), 1-jan., longa artikolo de S-ro J. Habert : « *Kio estas Esperanto* ».

∴ Esperanta semajna angulo, redaktata de S-ro Advokato Rayman en *El Noticiero* (Zaragoza, Hispan.), 7 jan.

∴ En *Journal du Cher* (Bourges, Franc.), 1 jan., « *Esperantista Kristnasko en Foëcy* ». — G.

∴ En *St-Ingberter Anzeiger* (St-Ingbert, German.) 15 jan. pri la ĝenerala kunveno de la loka grupo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO

Juraj Konsilantoj

Ĉar ni intencas aranĝi diversajn enketojn per niaj Juraj Konsilantoj, ni deziras unue kompletigi la liston de la ĝisnunaĵaj konsilantoj, tiamaniere ke en ĉiu lando estu unu. Por tiu ĉi celo ni petas, ke la Esperantianoj, kiuj estas juristoj kaj loĝas en la subaj landoj, bonvolu sin konigi al la Centra Oficejo de U. E. A. En la jenaj regnoj ne ankoraŭ ekzistas Jura Konsilanto: Bulgarujo, Danujo, Grekujo, Nederlando, Norvegujo, Portugalujo, Rumanujo, Rusujo, Serbujo, Svedujo, Turkujo, Kanado, Meksikujo, ĉiuj ŝtatoj de Sud-Ameriko, Aŭstralio.

Doganoj

U. E. A. intencas starigi specialan servon pri dogantariĝoj kun la kunlaborado de diverslandaj kompetentuloj. Ĉiuj Esperantianoj, kiuj plenumas oficon ĉe centra ŝtata doganadministracio kaj havus je sia konstanta dispono la necesajn dokumentojn pri dogantariĝoj de sia lando, estas petataj skribi al la Centra Oficejo de U. E. A.

Novaj Del. Vic. kaj Subdel.

ANNONAY (Francujo, Ardèche). — VD. : Louis Chenevriers, rue Greffier Chome.

BIZERTE (Tunizio). — D. : Lucien Mondésir, rue du Contrôle (Maison Fortin).

CHIARAMONTE GULFI (Italujo, Sicilio). — D. : Francesko Ferrante Rosso, studento.

COLORAINE (Irlando, Londonderry). — D. : Freeman W. Grofts, civila Inĝeniero, Railway Station.

DIJON (Francujo, Côte-d'Or). — SD. : G. Bourgeois, Elève de Mathém. spéciale, Lycée de Dijon (Liceo).

ECUVILLENS (Svisujo, Fribourg). — Josefo Vannier, ĝardenkulturisto.

GOES (Nederlando, Zelando). — D. : J. C. van Valkenburg, kanad-administradisto.

HOMEL (Rusujo, Mohileva gub.). — D. : David Vigodskij, ĵurnalisto.

LAPARROUGUIAL (Francujo, Hérault). — SD. : Lagriffoul, komercisto.

MOULIN-ROUGE (Francujo, Jura). — SD. : L. Crébely.

NOVO VILJUSK (Rusujo, Vilna gub.). — SD. : Georgo Staŝis, fervoja oficisto, Vokzal.

PORT-GLASGOW (Skotlando). — SD. : R. W. Mc. Parlane, Iybank.

ROYAN (Francujo, Charente-Inf.). — VD. : A. Raguideau, komercicisto, 37, rue de Printemps.

SOMMIÈRES (Francujo, Gard). — D. : Marius Paulet, kuracisto.

SANTA CRUZ DE TENERIFE (Islas Canarias). — VD. : Antonio Alvarez y Alvarez studento, Calle Santa Domingo 49.

WELSBURG (Aŭstrio, Tirolo). — D. : Richard Felser, fervoja oficisto.

WISNIZ (Aŭstrio, Galicio). — D. : D-ro I. Fragner, advokato.

Ŝanĝoj.

AMIENS : D., Reguer, 59, rue Louis Thulier. — CAIBARIEN : D., Celestino Arias Garcia, Patria No 8. — DÜSSELDORF : VD., M. Wiesner, Elisabethstr. 95. — HELMSTEDT : D., Faanz Resch, oficisto, Südertor. — VORONEJ : K. Veselovskij, Krutaja ulica.

En la jenaj regionoj, ne plu estas Delegito : DAGOIN, HILDEN, LEIDEN, MONTPELLIER, ROANNE, TEJKOVO.

Citoj.

AMSTERDAM (Nederlando). — D. : W. Nutters, Van Ostadestraat, (1-a cito).

Eksigo.

Esperantia Entrepreno : Internationaler Verkehrsbund (Berlin), konforme al § 15, de la Statuto.

Novaj Esperantiaj Entreprenoj.

ANNONAY (Francujo). — Annonaya Esperanto Grupo. Adr. : Ges-oj Theolier, rue de Deûme.

BUENOS-AYRES (Argentino). — Esperanta Grupo Casal Catala Adr. : Str. Tucuari 1402.

BUENOS-AYRES (Argentino). — Propaganda Klubo Esperantista. Adr. : Casilla de Correa 737.

COURS (Francujo). — Esperantista Grupo. Adr. : S. J. Rousset.

GENÈVE (Svisujo). — Senalkohola restoracio Billaud. Adr. : 18, Bd. Georges Favod.

GENÈVE (Svisujo). — Peasiono por Junulinoj, Dio. : S. Taeger. Adr. : 1, rue de l'Ouest, Delices.

KOTIBUS (Germanujo). — Esperantista Societo. Adr. : Goldener Ring, 46.

PARIS (Francujo). — Polica Esperantista Klubo. Adr. : Préfecture de Police.

POITIERS (Francujo). — Grupo Esperantista. Adr. Faculté des Sciences.

RADEBEUL-OBERLOESSITZ (Germanujo). — Esperanta Societo. Adr. : Th. Kempe, Kaiser Wilhelmstr. 6.

ORGANIZA DEMANDO

La Esperantista Grupo de Bourg (Ain) en sia ĝenerala kunveno de la 23 oktobro 1911 esprimis la sekvantan deziron

Konsiderante,

Ke ĝenerala organizaĵo de esperantistaro estas kredeble utila, ĉefe por igi plej efika kaj fruktodona la propagandon de Esperanto ;
Ke la praktikaj internaciaj servoj, similaj al tiuj, kiujn nun faras U. E. A. estas la plej bonaj rimedoj por fari utilan propagandon ;

Ke nur farante tiajn servojn ĝenerala organizaĵo povos facile trovi multnombrajn anojn, pagantajn individuajn kotizaĵojn, kiuj permesos al ĝi vivadi kaj prosperadi.

Sed konsiderante,

Ke U. E. A. tre bone funkcias, kaj faras ĉiujare multajn praktikajn servojn, kiuj konigas al ĉiuj ke Esperanto vivas praktike ;

Ke farante tion U. E. A. tre bone laboras por la propagando de nia afero ; propagando kiu estas la celo de ĝenerala organizaĵo ;

Ke organizi novan asocion celante fari, kiel U. E. A., praktikajn servojn estus malutila ago ;

Ke la Esperantistaro devas timegi la trommultigon de la por aŭ per-esperantaj internaciaj societoj ;

Ke ju pli multaj estos tiaj societoj despli malfortaj kaj nevivopovaj ili estos, ĉar :

1-e. Morala vidpunkte : La divido estas certa kaŭzo de malnoblar kaj malfortigantaj internaj kontraŭbataladoj.

Ĝis nun Esperantistaro tro vidis tiajn malgrandavimajn kaj malaltigantajn malkonsentojn, kiuj tedegas ĝin.

2-e. Praktika vidpunkte : La monhelpoj de la esperantistoj dividitaj inter pluraj societoj estos nesufiĉaj por ĉiu el ili.

Tiaj estas la kaŭzoj de la malsukceso kaj de la neprogreso de nia afero ;

La esperantista grupo de Bourg esprimas la fervoregan deziron ke anstataŭ malfacile organizi novan nevivopovan asocion ĉiuj fakoj de la ĝenerala organizaĵo grupiĝu kun U. E. A., por fariĝi unu sola forta internacia asocio, al kiu ĉiuj helpoj de la esperantistoj povos senŝancele kunveni.

La dua regiona kunveno en Krefeld, okazinta la 4-an de januaro, akceptis la jenajn decidojn :

Konsiderante, ke U. E. A., ĝis nun plej bone funkciis kiel Asocio por internaciaj rilatoj, ke la laboro de ĝi kun la naciaj propaganda-institucioj estas plej dezirinda, la Krefeldaj Esperantianoj decidis, ke la komisiono por ĝenerala organizo nepre ekzameni la proponojn de U. E. A., kaj prezentu al la Oka Kongreso projekton kiu plej bone helpos la disvastigon de U. E. A., plue, ke oni trovu metodon plej taŭgan por garanti la voĉrajton de rajtigataj Delegitoj

PRI ESPERANTISTAJ HEJMOJ

En multaj grandaj urboj ekzistas nun pluraj propagandaj societoj. Ĉiu el ili ĝenerale ne enkalkulas multajn anojn, ĉiu estas iom neriĉa, ne posedas propran sidejon. Tiuj societoj do kunvenas kutime en aparta ĉambro de kafejo, kie ĉiuj ĉeestantoj estas trude devigataj trinki (kaj se iu ĉeestas akurate, je la fino de l'jaro li estas elspezinta jam multe pro tio); plie la virinoj kelkafoje hontas solaj eniri kafejon. Aliaj societoj kies kaso estas iom pli riĉa, kunvenas en sidejo de alia neesperantista asocio, kontraŭ jam kara luprezo; tie ankaŭ ili ne estas hejme; kaj se la ĉambro apartenas al partia asocio, tio povas kredigi inter la publiko, ke Esperanto ne estas nepre neŭtrala. Malmultaj societoj kunvenas en lernejoj, kies unu ĉambron al ili dediĉis favora urbestro; tie, malkomforte la anoj enue atendas ĝis la frua horo, kiam la pordisto ilin elpelos. En tiuj tri okazoj, la plej oftaj, la ĉambro difinita al iu societo ne estas okupebla ĉiutage aŭ ĉiuhore; oni ne povas restadi trankvile, nek kanteti; inter la kunvenoj, neniu informo estas ricevebla ĉu de l'kafejmastro, ĉu de l'gardisto; oni ne povas havi afiŝojn aŭ libroŝrankon. Ĉu ne estus agrable, eĉ utile, posedi kvazaŭan klubejon konstante malfermitan, kie posttagmeze la geburĝoj babilus aŭ tralegus la gazetojn, kie oni sin renkontus, kie la trapasanta fremdulo trovus bonvolan gvidanton? Ofte oni bezonas en granda urbo vastan ĉambron por kursoj, por festoj, por paroladoj. Komencante sian nunan ĉirkaŭvojaĝon, S-ro Privat diris al mi embarason sian, kiam li estas vizitonta grandan urbon kun pluraj societoj. Li ne scias, al kiu sin turni por preparigi kunvenon. Oni bezonas ĉambregon, kaj ĝi estas tre kara. Se iu societo organizas, li timas ke la aliaj ne ĉeestos (pro jam tro ofta sperto). Estus ja certe pli oportune, se lia parolado okazus en neŭtrala loko, kie ĉiuj estas egalrajtaj.

Ĉe la IV-a en Dresden, S-ro Privat, mi ĝin memoras, prezentis raporton pri « Esperanto-domoj por la junularo », en kiu li, unua, uzas la vortojn: Esperantista Hejmo: « ...oni kreus Esperanto-domojn, kie troviĝus loĝejo, konsulejo, librejo kaj eble eĉ kunvenoj; ĝi estus ne nur hotelo por fremdaj junuloj sed ankaŭ klubejo, kaj biblioteko, kie la Esperantistaj junuloj de la urbo konatiĝus kun siaj fremdaj kolegoj ». Kial oni ne prenas ĉi tiun ideon, por ĝin iom malpliampleksigi sed iom plilarĝigi? Ne hotelo, sed nur kunvenejo, klubejo kaj biblioteko. Ne nur por junuloj, sed por ĉiuj *Gesamideanoj*.

Jen atentinda projekto. Kiel ĝin efektivigi? Mi ne rakontos teoriant solvon; mi montros praktikajn konsilojn laŭ tio, kio ja ekzistas.

En Lyon estas de 15 monatoj tia Esperantista Hejmo. Post unujara provo, mi sukcesis ĝin persistigi malgraŭ apartaj malfacilaĵoj. Tri punktoj estas konsiderotaj.

1^o *Finance*. — Ĉefe, por lui ĉambraron vastan en konvena domo ĉe l'centro de la urbo kaj ĝin agrable kaj komferte mebli, oni bezonas certan sumon kiel eble plej altan por la kreo, kaj promeson de subteno por la sekvo. Unue oni kolektu ĉiajn donacojn, due oni proponu al la lokaj societoj lui ĉambregon por iliaj kunvenoj, trie oni ricevu malkaran enskribigon de la individuoj kiel en klubo, kvare oni grupigu respondontojn (en formo de akcia societo, aŭ de financa konsilantaro, aŭ alie). Kompreneble, se ne ĉiuj vesperoj estas okupitaj, oni povas luigi al neesperantista societo.

2^o *Administre*. — Tia Hejmo estu nur kunvenejo, sed nepre ne societo. La administrantaro devas havi preskaŭ nur financon rolan, kaj ne sin enmiksi en lokajn disputetojn. Se eble, la kaso helpas al ĝenerala propagando, kaj la

Hejmo aliĝos al U. E. A. kaj al nacia societo kiel Esperantia Entrepreno aŭ kiel bonfaranta membro. Oni ne bezonas prezidantojn; ju pli malmultaj estos la administrantoj, kaj energiaj, des pli bone ili sukcesos; la eminentuloj estas jam tro okupitaj por vigle prizorgi tian entreprenon.

3^o *Morale*. — Oni povas allogi la societojn per nekara luprezo kaj veraj utiloj, kaj la individuojn per laboraj seriozaj kunsidoj, festetoj, esperantaj paroladoj, k. a. Tia Hejmo povas fariĝi centra konstanta propagandejo per ekspozicio ĉiumonate ŝanĝata, en kiu ĉiu Samideano estos feliĉa prunti siajn dokumentojn. Se malfacile oni trovas kursejon en la urbo, kelkaj instruistoj bonvolos helpi. Sed antaŭ ĉio, la organizaĵo sin turnas al la jamaj Esperantistoj, proponante al ili facilajn kaj agrablajn rimedojn por pli profunde studi la lingvon kaj precipe ĝin utiligi kaj uzi. Povas okazi, ke kelkaj jaluzos komence tiun organizaĵon, sed kiam ili estos bone komprenintaj la veran celon: utili al Esperantistaj societoj kaj individuoj, tiam ili certe kunhelpos; ne estas ebla konkurenco inter Hejmo kaj societo. La devizo de Esperantista Hejmo povas esti: propagando, instruo kaj utiligo de Esperanto.

Mi estos feliĉa doni letere ĉiujn pluajn informojn; bonvolu skribi al la Sekretario de Administra Konsilantaro de Esperantista Hejmo, 78, rue de l'Hôtel-de-Ville, Lyon.

L. P.

NEKROLOGIO

A. VAN DER BIEST

Je la momento presigi nian gazeton, ni kun granda ĉagreno eksciis malĝojan novaĵon: S-ro Amatus Van der Biest, organizinto de la Sepa Kongreso de Esperanto kaj unu el la plej fervoraj pioniroj de nia movado en Belgujo, mortis en Antverpeno la 22-an de Januaro. En nia venonta n-o ni pli detale parolos pri la vivo de tiu sindenema samideano, kiu tiel senlace laboris por nia afero kaj al la kiu Esperanto en Belgujo tiom ŝuldas.

Al lia familio ni sendas la esprimon de nia respektplena simpatio.

Esperantia Vivo

Morto. — Kun granda malĝojo ni informas niajn legantojn, ke la fervora Rumana Esperantista pioniro D-ro Robin (Bukarest) mortis. Unu el niaj kunlaborantoj sendos al ni kelkajn biografiajn notojn pri tiu sindonema samideano.

Edziĝoj. — Nia Delegito en Halifax (Kanado), S-ro John Morris Geldert ĵus edziĝis kun F-ino Laura Eadon.

En Lisbono (Portugal.) nia Del. S-ro B. Martins d'Almeida edziĝis kun norda fraŭlino.

Naskiĝo. — Al Ges-roj G. Rousseau en Moreuil (Somme, Franc.) naskiĝis filo. Korajn bondezirojn al la juna René.

Esperantia Parolejo

En malproksima Siberio

Kiel Sub-Delegito, mi volas averti miajn korespondantojn ke, kvankam poŝton mi ricevas regule unu fojon semajne kaj nenio perdiĝas (mi havas grandan internacian interskribadon), tamen mi

neniam povas tuj respondi, ĉar el mia vilaĝo poŝto ne iras tiel akurate. Mi volonte faros diversajn servojn al ĉiuj samideanoj; sed ili ne juĝu min severe, se ili ne baldaŭ ricevos la petitajn informojn: ili ĉiam venos, sed ne tuj.

Mi profitas la okazon por anonci, ke Esperanto grade disvastiĝas en nia transbajkala regiono. En Ĉita oni malfermis grupon. Ankaŭ en la vilaĝoj estas konstateblaj progresoj, precipe inter la klerularo: popolaj instruistoj, pastroj, psalmlegistoj, k. t. p. En vilaĝoj sur la bordo de rivero Ĉikaj, same ĝojiga fakto; en vilaĝoj *Sergolĝin*, *Bajhor*, *Krasnij-Jar*, *Urluk*, troviĝas samideanoj kaj esperantianoj; trans poŝtoficejo en Krasnij-Jar venas 12 esperantaj gazetoj kaj multe da literaturaĵoj. Tiuj disigitaj samceluloj unuigas ĉirkaŭ la reprezentantoj de U. E. A.

Pastro I. SERIŠEV,
Selo *Sergolĝin Krasnij-Jar*,
Verhneudioskij Vezd.

Oni laŭdas!

∴ S-ro *Constant Martin*, instruisto en Chargros Chatelmontagne, kore dankas S-rojn *Kalisky* (Del. Londono), *J. Silbernik* (Del. New-York), *F. Mathieux* (Del. Bruxelles), *F-inon H. Josefson* (Del. Stockholm) pro la siadone liveritaj informoj pri instrua temo.

∴ S-ro *Herbert Harris*, de Portland, Maine, Usono, tutkore dankas la Esperantan Hotelon du Globe, en Parizo, kaj la Esperantistojn en Barcelono, Madrido, Seviljo kaj Gibraltaro, kiuj faris tre agrablaj liajn postkongresaj vizitojn en tiuj urboj.

∴ S-ro *G. Baire*, Del. Boulogne-s-Mer, esprimas koran dankon al la Delegitoj kaj Esp.-ianoj renkontitaj dum lia vojaĝo tra Nederlando: S-roj *Pothast*, S-roj *Krijn*, *Pakker*, *Schneiders*, *Snel*, *Groscamp*, *Habermehl*, ktp., pro iliaj afablaj servoj.

∴ Dum septembro, mi libertempis en Kaŭkazo. Reveninte Peterburĝon, mi korege dankas ĉiujn samideanojn, kiuj agrabligis mian restadon en tiu lando, interalie S-ron *A. Zakrjevski* (Del. Ekaterinodar), S-rojn *Mkrtiĉjan* kaj *Babeljan* (en Batumo). Ankaŭ en Tifliso mi trovis varman akcepton. Neniam mi forgesos tiun restadon. — *R. Lorencson* (Del. Peterburĝo).

∴ S-ro *F. Laveran*, komerca riprezentanto en Toulouse (Franc.) prezentas sian plej koran dankon al ĉiuj Delegitoj, kiuj lin helpis en komercaj entreprenoj. Ĉar la listo al ni sendita entenas pli ol 40 nomojn, ni ne povas ĝin publikigi, pro ĝia longeco.

Fakaj Societoj

Esperanta-Psikistaro

La *Esperanta-Psikistaro*, internacia unuigo por psikisma studado per Esperanto, kies honora prezidanto estas S-ro Boirac, eldonigis du interesplajn broŝurojn. En la unua, kiu estas kunlaborada verketo, aperas artikoloj de S-roj Boirac (Pri Esperantismo kaj Psikismo); C. Flammarion (La Psikaj Faktoj); J.-C. Chaigneau (De Psikismo al Homaro Integrala); Le Cornec (Esperanto kaj Spiritualismo); K-o Darget (Pri la homa destino kaj Dio), ktp...

La dua broŝuro enhavas plenan raporton pri la subkongreso de la E. P., okaze de la *Sepa*. En ĝi oni povas legi la raporton de la sekretario kaj detalajn informojn pri la psikaj eksperimentoj faritaj en Antwerpen (Sugestiaj, tiptologiaj kaj hipnotismaj eksperimentoj). Provo de psikisma terminaro finas la broŝuron. Kiun, kiel la alian, oni povas mendi, senpage, ĉe: Sekretariejo de E. P. 26, rue Appelmans, Antwerpen (Belgujo).

M. G.

Alvokoj

Ekspozicioj

∴ Por pli sukcesigi nian movadon en Ufa kaj konvinki skeptikulojn, mi baldaŭ aranĝos ekspozicion de ĉiaj esperantaĵoj. Ĉar mia kolekto por tiu celo bedaŭrinde estas ne sufiĉe kompleta, mi petas

ĉiujn eldonistojn kaj aliajn samideanojn helpi min, sendante al mi specimenojn de gazetoj, libroj k. a. esperantaĵojn por tiu ekspozicio, kiu poste estos ĉiam ripetata. Antaŭdankon!

Delegito VETERINARO N. FOSS,
Rusujo, UFA.

∴ Same en Capodistria. Oni bonvolu sendi al ni (aŭ prunte, aŭ donace) tiom da esperantaĵoj, kiom eble; fotografiaĵoj kun subskribo estas ankaŭ plezure akceptataj kun antaŭa danko al ĉiuj helpantoj! Adreso: *Capodistria* palaco Percolt de Foscarini, Via Eugenia.

Antonio MINUTTI, Instruisto.

∴ Al la sama celo, mi decidis en nelongedaŭra tempo organizi en mia urbo esperantan ekspozicion. Por atingi ĝin, estas al mi necesege havi la vidaĵojn de diversaj landoj, ekzemplerojn de esperantaj gazetoj kaj ĵurnaloj kaj ankaŭ la katalogojn de firmoj, uzantaj la lingvon internacian.

Ne dubante, ke ĉiu fervora esperantisto, alportos al mi laŭfortan helpon, mi permesas al mi peti ĉiujn samideanojn, redaktejojn kaj firmojn sendi al mi la vidaĵpoŝtkartojn (la poŝtmarkojn oni devas glui bildflanke), ekzemplerojn de gazetoj, kaj katalogojn, laŭ jena adreso: Rusujo, Siberio, u. *Krasnojarsk*, Gubernia Akciza Oficejo al.

Anatolo GRIGORJEV.

∴ En Toulon, la Delegito kaj la grupo aranĝis en publika ĉambro de grava loka ĵurnalo, konstantan ekspozicion pri U. E. A., kaj ĝenerala propagando. Ĝi estas tre vizitata kaj elvokas grandan intereson. La Delegito tre danke akceptos ĉiujn librojn, gazetojn, gvidlibrojn, reklamilojn, poŝtkartojn, k. t. p., kiujn oni bonvolos sendi tiucele. Adreso:

P. Béranguier, Toulon, 20, rue des Bonnetières, (Var, France).

Alia urbo provos Esperanton

Al ĉiuj esperantistoj kiuj deziras ian ajn informon pri urbo Tacoma aŭ ĝia ĉirkaŭaĵo nia komerca klubo estas nun preta respondi en Esperanto. Ni esperas ke ĉiuj interesatoj prenos ĉi tiun okazon por informi sin pri la vasta kaj mirinda okcidento. La okcidento estas la estonta lando; Washington estas la ŝtato de promeso, kaj senhezite ni povas rekomendi Tacoma kiel la plej belegan kaj la plej allogan urbon en nia ŝtato. Ĝi estas moderna urbo kun pli ol 100.000 loĝantoj. Ĝia alloga ĉirkaŭaĵo, ĝia milda klimato (somera temperaturo 60-65 gradoj, vintra 40-45 gradoj), ĝia beleco kaj pureco igas ĝin ideala urbo por la hejmsercanto. Ke tio estas fakto atestas la ĉesto en nia urbo de multe da progresemaj alilanduloj. Skribu ankoraŭ hodiaŭ al « Commercial Club », Tacoma, Washington, U. S. A.

Esperantaj Fonografoj

La muzikebdonejo Besnard, 26, rue Antoinette, Parizo, kiu faris alvokon en nia gazeto (No 114) pri platoj kun esperantaj kantoj kaj paroladoj, informas la multajn korespondintojn, ke de nun afero estas ebla. Ĝi intencas komenci kompreneble per la verkoj de nia Majstro, ekzemple « La Espero » (kanto), Preĝo sub la verda Standardo » (deklamo) kaj aliaj. La diskoj kostas po 2 Sm., ne kalkuliante la sendelspezojn; ĉiu entenos du kantojn aŭ deklamojn.

Al ĉiulandaj amikoj de Paris

Jus aliĝis al U. E. A., kiel Esperantia Entrepreno, la tre grava Asocio *Les amis de Paris* (La Amikaro de Paris) kiu, post apenaŭ unu jaro de ekzisto, jam enhavas pli ol 1.500 membrojn.

Aliĝante al U. E. A. la *Amis de Paris* deziras unue montri sian simpatian al nia afero sed, ankaŭ kaj precipe, provi utilecon de nia lingvo kaj vidi la servojn kiujn ĝi povas fari, per U. E. A. Sekve la estraro de tiu asocio esprimis al mi, insiste, sian deziron, havigi al si, nur per Esperanto kaj U. E. A., reprezentantojn kaj delegitojn en la ĉefaj urboj nefrancaj.

Ĉiuj esperantianoj komprenos la gravecon de tiu provo kaj faros, mi estas certa, ĉion eblan por efektiviigi tiun projekton kaj ĝin sukcesigi.

Mi do mia turnas al ĉiulandaj amikoj de nia franca ĉefurbo kiuj akceptus labori kun ni, per Esperanto por konigi Parizon ekster-

landan, per privata propagando, paroladoj, artikoloj, disdono de reklamoj, ktp. aŭ nur por helpi nin morale, akceptiate, ekzemple, titolo de delegito de la A. de P. en sia urbo aŭ regiono.

Mi esperas ke mia alvoko estos aŭdata kaj ke ĉiuj bonvolaj samideanoj, esperantianoj kaj delegitoj de U. E. A., — precipe tiuj kiuj uzas la lingvon francan, sin konigos al ni. Mi restas je ilia dispono por havigi al ili ĉiujn necesajn sciigojn kaj pluajn detalojn pri la celo kaj stato de la *Amikaro de Paris* kaj kondiĉoj de delegiteco. Ili nur akribu al mi, esperante, per respond-poŝtkarto adresita al *Les Amis de Paris*, 167, rue Montmartre, Paris, kun tiu aparta noto: « por S-ro Gènermont, Del. U. E. A. ».

M. G. (Del. Paris).

Nova Societo

Nun ekzistas tra la tuta mondo civilizita pli ol tridek milionoj da homoj kiuj kore malaprobis la nunajn metodojn de la kuracado de korpaj malsanoj per drogoj, kaj tute eble estas pli ol dudek milionoj da sekvantoj de tiu kredo kiun fondis la mondfama S-ro Mæz Baker G. Eddy de Bostono. Preskaŭ samnombro, eble, ekzistas la adaptoj de aliaj kredoj kaj sistemoj, kiel ekzemple, la verkuracistoj, hidropatiistoj (akvokuracistoj) fastadistoj, ktp., ktp. Tamen, mi ne volas diskutadi ĉi tie la meritojn aŭ malmeritojn de la kontraŭ-drogaj metodoj, mi volas pritrakti, precipe, pri la fondebleco de tia societo por la samideanoj, kiuj estas entuziasmaj pri tiu temo. Kompreneble, ĉiu el ni scias, ke jam ekzistas Esperanta kuracista Asocio, la T. E. K. A., kaj mi ne povas kompreni kial ni ne ankaŭ povas havi unu. Parolante nenion pri la profitoj gajneblaj el tia movado, oni devas ĉiam memori ke kiam fondiĝas ia asocio (Esperanta), pli bone montriĝas la utileco de nia lingvo kaj ju pli multajn aferojn ni havas por interesi nin kunularon, des pli bone kreskos la nombro de samideanoj. Mi esperas ke per tiu ĉi malgranda letero mi jetis ideon, kiu ne restos senresponda.

ILO MISTA.

UNIVERSALA ESPERANTIA LIBREJO

10, rue de la Bourse, GENÈVE (Svis.)

JUS APERIS:

Kultureladoj de la nuntempo

de Prof. D-ro Aug. FOREL

EKSDOCENTO DE L'UNIVERSITATO DE ZURICH

Prezo: Sm. 0,50 (afranke)

Tiu ĉi nova verko de la fame konata sciencisto traktas la plej gravajn nuntempajn sociajn problemojn en konciza, interesplena kaj populara maniero. Jen la titoloj de la ĉefaj ĉapitroj: Eliko kaj Religio, Medicino kaj Higieno, Nacia ekonomio, Milito, patriotismo, politiko kaj nacia etiko, Mondlingvo, Seksa problemo, Socialismo, Lernejo kaj edukado.

Paulo Debenham

Romano originale verkita en Esperanto de H. A. LUYKEN

227 paĝoj: Prezo: 1,12 Sm. (afranke)

Jen alia pruvo de la vivanteco de nia lingvo! Ĉiu Esperantisto nepre devas posedi tiun ĉi romanon, ne nur por ĝui ĝian tre interesan kaj kelkefoje ekscitan enhavon, sed por montri al skeptikulo, ke nia lingvo havas propran originalan literaturon. La romano estas verkita en tre facile legebla stilo, kiu ofte rememorigas al ni la fluan stilon de la bedaŭrata D-ro Vallienne. La karakteroj estas majstre desegnitaj, kaj rakonto tiel lerte disvolviĝas, ke la leganto iras de ĉapitro al ĉapitro kun kreskanta intereso.

HISTORIETO DE ESPERANTO

de D-ro Andreo FİŞEN

Premiita ĉe la literatura konkurso de la VII-a. Universala Kongreso de Esperanto

Prezo: Sm. 0,24 (afranke).

Tiu libreto tre klare resumas la ĝisnunan historion de nia movado.

Ornitologia Vortaro

oklingva de birdoj Europaj

de P. E. STOJAN

216 paĝoj. — Prezo: Sm. 1,20 (afranke).

NOVAJ LIBROJ:

Fabiola. — Granda romano pri la Katakombaj kaj komencoj de Kristanismo, de Kardinalo Wiseman, trad. E. Ramo. Dika volumo in-8, 427 paĝoj. — Prezo: Sm. 1,40; (afranke) Sm. 1,76.

Albrecht Dürer. — Lia vivo kaj elekto el liaj verkoj. Kun klarigoj de la apartaj folioj. Luksa volumo da 93 paĝoj kun 57 belegaj reproduktajoj de la majstro. Verkoj de fama pentristo (trad. de la Germana Esperanto-Asocio. — Prezo: Sm. 2 — Lukse bindita: Sm. 2,50.

La Ponto. — La organizado de la Intelektala Laboro per « La Ponto ». De K.-W. Bühner kaj Ed. Saager. Trad. de J. Schmid. L. K. 157 paĝoj. — Prezo (kartonite): Sm. 2.

Esperantista Kantaro. — Kolekto de 17 originalaj aŭ tradukitaj kantoj. Vortoj kun muziko por 4 voĉoj. Konataj kaj ŝatataj melodioj. Necesege al ĉiuj grupoj. — Prezo: Sm. 0,40.

Tra Belglando, Nederlando kaj Anglolo, per Esperanto, de R. di Rienzi. Interesa kaj bonhumora raporto pri vojaĝo farita ekskluzive per Esperanto kaj dank'al Esperanto. Rekomendinda legolibro kaj propagandilo por la Esperantaj kursoj. Broŝuro 32-paĝa, mono. — Prezo: Sm. 0,20.

Demandaro pri la Historio, Literaturo kaj Organizaĵoj de Esperanto por Esperantaj Ekzamenoj. Grava verketo por ĉiu lernema Esperantisto. Verkis R. de Ladevèze. — Prezo: Sm. 0,50.

Kion la Vivo alportis. — Dek originalaj poemoj de D-ro Schnlhof, Antaŭparolo de M. Hankel. — Prezo: Sm. 8,20.

Por ĉiuj supraj verkoj, aldonu 10 % por la afranko

OFICIALAJ ELDONAĴOJ DE U. E. A.

(Propagandiloj)

Esperantismo. — La internaciaj rilatoj. Esperantismo kaj Esperanto. La servoj de U. E. A. Elementoj de Esperanto.

Propaganda broŝuro de H. Hodler. Havebla en la lingvoj *angla, franca, germana aŭ rusa*.

Prezo (afranke): Sm. 0,10. Por meĉdoj de pli ol 10 ekz. rabato da 33 %.

La Internaciaj rilatoj. — Propaganda okpaĝa folio pri la servoj de U.E.A. Havebla en la lingvoj *angla, franca aŭ germana*.

Prezo (afranke): 10 ekz., Sm. 0,10. 100 ekz. Sm. 0,80.

Ambaŭ supraj verkoj estas rekomendataj al ĉiuj propagandistoj.

Oficiala insigno

Verda stelo kun blank-ora rando, literoj U. E. A.

Pinglo aŭ broĉo. . . Sm. 0,36 Butono Sm. 0,48

Ori aldonu Sm. 0,10 por rekomendo.

Oficiala skribmaterialo

Leterpapero, 100 ekz. \$ 0,75 Poŝtkartoj arte ilustritaj

Kovertoj, 100 ekz. \$ 0,60 10 ekz. \$ 0,40

Poŝtkartoj, 100 ekz. \$ 0,75 (Kun la bildo de D-ro

Zamenhof), 100 ekz. \$ 0,60

Universala Esperantia Librejo

10, rue de la Bourse, GENÈVE (Svis.)

REKLAMO

TARIFO

Anoncetoj.

KORESPONDADO. — Unu enskribo (2 linioj): 20 Sd (= 50 centimoj).

PETĴOJ & PROPONOJ; KOMERCAJ REKLAMOJ. — Unu linio (10 vortoj) 15 Sd (= 40 centimoj).

Niaj abonantoj rajtas unu enskribiĝon por korespondado aŭ dulinian anonceton senpage.

Reklamo.

1 linio aŭ ĝia spaco 20 Sd (= 50 centimoj).

Por 4 enpresoj (anonceto aŭ reklamo) rabato de 10 o/o; por 12 enpresoj, 25 o/o; por 24 enpresoj (unu jaro), 50 o/o.

AVIZO. — Ĉia reklamo aŭ anonceto estu sendata antaŭ la 10-a kaj 25-a de ĉiu monato al nia administrejo aŭ per niaj agentoj. Antaŭa pago per poŝtmandato aŭ respond-kuponoj. Naciaj markoj ne akceptataj (krom por Hispanujo Rusujo).

GENERALAJ AGENTĴOJ. — G. Wernier, 1, Avenue de Sceaux, Versailles; Publicité Esperanto Herlemont, 25, rue Saint-Vincent-de-Paul, Paris, X^e; S-ro A. Dupuis, rue de l'Arc-de-Triomphe, 2, Paris; A. G. Browne, 20, Wellington St. Strand, London, W. C.; Tutmonda Esperanto-Anoncekspedo, Th. Auding, Berlin, S. W. 48; Germana Esp. Librejo, Sternwartenstr., 40, Leipzig; Esperanto-Librejo, Tverskaja 28, Moskvo.

KORESPONDADO

La subaj anoncetoj pri Korespondado estas publikigataj sen garantio de ni pri regula respondo.

La personoj, kiuj deziras korespondi en daŭra maniero kaj havi garantiojn pri akurata respondo, aliĝu al la nova fako de U. E. A. « Universala Interŝanĝa Asocio » (kotizaĵo 0.50 Sm.), speciale starigita por faciligi la riletajn inter korespondantoj kaj kolektistoj. La adresoj de la membroj de la Interŝanĝa Asocio estas publikigataj en la Interŝanĝa Bulteno.

L = letero. PK = poŝtkarto. PI = poŝtkartoj ilustritaj. PM = poŝtmarkoj. b. fl. = bildflanko.

ABBEVILLE (Francujo, Somme). — S-ro Turey-Racine, 12, boulevard de la République, PI. L.

AMIENS (Francujo). — S-roj René Hautecœur kaj Maurice Mautecœur, 46, rue St-Jacques, PI.

AMIENS (Francujo). — S-ro Karlo Seigneur, 109, rue St-Jacques. BAD REICHENHALL (Germanujo-Bavarujo). — S-ro E. Schwartz, Villa Continental, nur PM. (nur kun necŭropanoj).

BARCELONO (Hispanujo). — S-ro José Valero, San Gil 7-4-1-a, PK. L. (precipe pri teatraj aferoj).

BOSCOCHESANUOVA (Italujo, Verona). — S-ro Able Finazzi, PI. PM.

BOULOGNE-SUR-MER (Francujo). — F-ino Louise Haignéré, instruistino, 149, rue du Moulin à Vapeur, PI.

BRADFORD (Anglujo). — S-ro Roland William, 56 Wharnccliffe Drive-Eccleshill, PI.

BRUNSWIG (Germanujo). — S-ro Robert Bartels, poste restante, PI., PM., bfl. (kolektas Esp. ĵurnalojn).

BRUSELO (Belgujo). — S-ro V. Lamberts, poste restante, PI. bfl. BRUSELO (Belgujo). — S-ro Kersten, 412, Avenue de Jette, belaj PI., (nur kun ĉefurbanoj de Eŭropo, kaj kun ĉiuj ne-Eŭropanoj.)

COLMAR (Germanujo). — S-ro J. Grillon, Rösschmannstr. 1, PM. (nur kun necŭropanoj).

DRESDEN (Germanujo). — S-ro Willy-Bratfisch, asekura oficisto, Dresden N. 17, Radebeulerstr. 8 II, PI., L., PM.

DRESDEN (Germanujo). — Esperanto-Unuiĝo Zamenhof, prez. M. Tschner, Tzschimmerstr. 3 (petas alsendon de esp. gazetoj kaj PI., el ĉiuj landoj por propagando).

EGUVILLENS (Svisujo, Fribourg). — S-ro Joz. Vannier, PI., bfl. (kiuj havas bildojn de soldatoj kaj urbaj vidaĵoj).

EKATERINBURG (Rusujo). — S-ro Serge Riabov, Glavn prosp., 9 PI., L., PM.

EKATERINBURG (Rusujo). — S-ro Anatole Fédoséev, Klubnaja, 8, PI. ELBERFELD (Germanujo). S-ro Plate, Ravensburgstr. 32, prez. de la grupo « Verda Stelo » (la gekursanoj de la grupo dez. koresp. kun eksterlandanoj).

GENOVA (Italujo). — La lernantoj de la Liguria instituto de Esperanto: Salita Pollaiuoli 13-4 Genova, de ĉiuj aĝoj kaj kondiĉoj deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj. (Ĉiam aldonu la aĝon kaj kondiĉojn).

GERONA (Hispanujo). — S-ro Alberto Pastells, str. Nueva del Teatro, 16, 2-a kaj S-ro. Elia Pigun strato Ruella 5, PI. (kun alilandaj samideanoj).

HORUICE APUD ĈASLAV (Aŭstrio, Bohemujo). — S-ro Karel Skrivaneck, instruisto, PI. L. (precipe kun kol. instruistoj).

CISKUNHALAS (Hungarujo). — Hoenig Ferenó, PK., bfl., PM., bfl. KOELN (Germanujo). — S-ro Kral Anton, Baumwollspinnerei, PI.

KENIGSBURG (Germanujo-Prusujo). — S-ro Wilhelm Krug, Philosophendammgasse, 17, PI. (kun eksterlandanoj).

LUCK (Rusujo-Wolynska). — S-ro Josef Wojcikiewicz, Ostrojec, librotenisto de Administrejo Ostrojec (interŝanĝi skemojn de terkulturaĵoj, fotografajojn, PI., PM.)

MANLEU (Hispanujo). — S-roj Felipe Guardia, str. Sr. Martin 27 Francisco Erre, str. Sr. Antonio 17.

MONTEVIDEO (Urugay). — S-ro Raŭl V. Idoyaga, Casilla de Correo 303, PI., K. (kun ĉiulandaj samideanoj, escepte francaj, anglaj, germanaj, aŭstriaĵoj kaj rusaj. Respondo laŭ deziro per 2 aŭ 3 kartoj).

MOREUIL (Francujo, Somme). — S-ro René Bultel, 7, place Parmentier, PK.

NOVOĈERKASK/DONA (Rusujo). — S-ro Borisó Popov, Mariynskaja 36, PM.

NOVOĈERKASK/DONA (Rusujo). — S-ino Klaŭdia Popov, Mariynskaja 36, PI. (belaj kapetoj kaj tipoj, kun ĉiuj landoj).

NOVOĈERKASK/DONA (Rusujo). — S-ro A. Ponomarev, Unijne Oblastnogo Hospitala, PI.

OMSK (Siberio). — S-ro Al. Vjetoĥen, Dumskaja 81, PI.

PASZTOHAZA (Hungarujo Vas-megye). — S-ro Kalzman Wencel, instruisto PI.

PETERSBURG (Rusujo). — S-ro K. V. Popov, 5 Tarakanovka, PI. (speciale kopioj de pentraĵoj kaj prefereskulptaĵoj de lokoj pinakotekaj).

PODGARZE-KRAKOV (Aŭstrio, Galicio). — S-ro Michaelo Sudlitz, PI. L. PRAHA (Aŭstrio, Bohemujo). — S-ro Josef Sourek, stud., Akademické gymn. PI.

OMSK (Siberio). — S-ro V. Levin, Atamanskaja 5.

RADONVILLERS apud Dieuville (Francujo, Aube). — S-ro Marcel Mielle, St. Gallen (Svisujo). — Esperanto-Klubo, PI.

UH. HRADIŠTE (Aŭstrio, Moravio). — S-ro Vitorio Beniĉek, stud. de komerca lernejo, (pri ĉio ajn PI., L. ktp.).

VARSOVIO (Rusujo). — S-ro Josef Finkelsztajn, str. Złota 59-a PI. (proks. 25 Esp. Esp. junuloj per tiu adreso).

K. VINOHRADY (Aŭstrio, Bohemujo). — S-ro Jos. Jarolim, Palackeho tr. 53, PM., PI.

WARNSDÖRF (Aŭstrio, Bohemujo). — S-ro Robert Hoffmann, 1204/IV, PI., PM.

PETĴOJ KAJ PROPONOJ

ATENTU! Bonvolu antaŭsendi Mk 1 (1 fr. 25) kaj vi ricevos sukcesplenan novan kanton: *Mi amas vin* (5 ekz. Mk 4. — Fr. 5; 12 ekz. Mk 8. — Fr. 10; 20 ekz. Mk 12. — Fr. 15; 40 ekz. Mk 20. — Fr. 25. — S-ro Felix Hlobil, Valaš. Meziriĉi, Austrio-Moravio.

TEKNIKISTOJ! — S-ro O. Melzer, instruisto, Annabergerstr. 247, Chemnitz (German.) (petas adresojn por junaj teknikistoj, ne en Germanujo).

ESPERANTISTOJ! — Ĉiu, kiu sendas al mi PI. kun skulptaĵo (plej volonte monumento kun rajdanta viro) ricevos senpage: Svedan kanton sen melodioj. Adreso: E. Finn, Upsala-Svedujo.

FAMILIA PENSIONO en ĉarma loko. F-ino Cianferoni, Lung' Arno Acciainoli 2 bis. Firenzo. Oni parolas Esperante.

FRAŬLINO, bone edukita, parolanta perfekte francan kaj anglan lingvojn estas serĉata por 3 geinfanoj 12-10-9-jaraj. Oni skribu al S-ro Quambusch, apotekisto en Coeln-Deutz (Germanujo).

GERMAN-AŬSTRIA ESPERANTISTO. — Pri la 8 a internacia kongreso Esperantista 1912 informas bonege la oficiala organo de la Ligo de Germanlingvaj Aŭstriaĵoj: German-Aŭstria Esperantisto. Ĉiumonate Esperante kaj Germane. — Jara abono Sm. 1,25 — k. 3. Administracio: Wien VI, Dürergasse 19.

POŝTMARKOJ. — S-ro V. J. Perevalov, termezuristo, Lugovaja ul., 54, Irkutsk (Siberio) interŝanĝas kolektojn da rusaj PM. je kolektoj da diversaj regnoj aŭ PI. karakterizantaj aliajn landojn.

JUS APERIS: LA TREZORO DE L'ORAJISTO, historia romano de August Senca, la sudslava Turgenjev. Trad. Fran Kolar Krom (Bjelovar, Kroatoj) 29^e paĝoj kun portreto de la aŭtoro. Nur 1 Sm. — Aĉetebla en ĉiu librovendejo kaj ĉe la tradukinto. Alilandulo aldonu 15 % por afranko.

KORESPONDANTO esperanta, germana, bohema slovaka kaj magiara serĉas situacion. Adresu: Jollay, Brno, Herlothova ul. ĉ. 4 patro 4 (Aŭtriche).

KRIZANTEMoj kun grandaj floroj. Kolekto da 250 malsimilaĵoj. Ofertas junajn kreskaĵojn tre vivantajn, sendehajn en Marto-Aprilo. Prezo: 5 frankoj po 12 specoj malsimilaj, koloroj tre diversaj. Katalogon laŭ peto. S-ro A. Hollert, amatora ĝarden kulturisto, Boulogne-sur-Mer (Francujo).

INTERŜANĜO. — S-ro Muffang, licea profesoro, Angers, France, dez. sendi sian filon 15-jaran en germanlingvan familion, prefere instruistan, kaj ricevi interŝanĝe samjaran junulon.

POŝVORTARO. — Tre interesa libro por hispanlingvanoj kaj fremduloj vizitantaj latinajn landojn. Enhavas pli ol 10.000 radiokojn. Lukse bindita 2 Fr. Adresu al S-ro X. Tuduri, S. Sebastian (Hispanujo).

S-RO RAFGANOV petas insiste siajn korespondantojn, skribiatajn al li laŭ lia anonco en Noj: 113 kaj 114 de « Esperanto », ree skribi al li, ĉar tiuj leteroj okaze ne estis ricevitaj. Adresu: Rusujo, poŝto Pjatihori, Kiev gub., poste restante.

ŜANĜO DE LA JURNALO « DIA REGNO » monata organo por interoacia Kristana Misio per Esperanto. De la 1-a de Januaro tiu ĉi ĵurnalo regule enhavas literaturan aldonon: *La Stelo de l'Feliĉo*. La jarabono je la gazeto kaj aldonon kostas 1,500 Sm.; je la gazeto sen aldonon 1,000 Sm. Kiu intencas aboni, postulu senkoston specimenon de S-ro Paul Hübner, Dellbrück ap. Koeln (Germanujo).

TAJLORO KAJ PENTRISTO serĉas laboron en Svisujo. Propojn al adreso Hubert Brezina, Sobeslav (Aŭstrio-Bohemujo).

VINO-EKSPORTO, pogrande kaj malgrande al ĉiuj landoj. Riprezentisto: Paul Hess, Roon-str., Hannover, Germanujo.

LINGVO INTERNACIA

Centra organo de la Esperantistoj

La plej malnova el ĉiuj Esperantistaj gazetoj. Fondita en 1895

15-20

Abono: 5 fr. (2 \$)

JUNA ESPERANTISTO

Monata beletristika Gazeto por junuloj, instruistoj kaj Esperanto-lernantoj

Ordinara enhavo: Rakontoj kaj Noveloj, Fabeloj, Poemoj, Lingvaj ekzercoj, Amuzoj, Problemoj

Jarabono: 2.50 fr. (1 \$)

SPECIMENO SENPAGE RICEVEBLA

Preso Esp. Societo, 33, rue Lacépède, 33, PARIS

JUS APERIS:

KARAKTERO,

laŭ M. J. M. Van Stiprian LUISCIUS, advokato en Hago, tradukita laŭ la 5-a Nederlanda originalo. En 24 ĉapitroj la aŭtoro priskribas la proprecojn de bona karaktero. Ĉiu serioza Esperantisto ĝin nepre aĉetu!

Enhavo 30 paĝoj. Prezo 0,200 Sm.; afrankite 0,250 Sm. Mendu ĝin per la Esperantistaj librejoj aŭ ĉe la eldonisto, Librejo « Esperanto », Prinestraat, 48, Hago (Nederlando).

GERMANA ESPERANTISTO

La gazeto aperas en du eldonoj, kiuj duonmonate alternas.

Eldono A, eliranta la 5-an de ĉiu monato, celas la propagandon por Esperanto.

Eldono B, eliranta la 20-an de ĉiu monato, estas pure literatura.

Jara abonprezo por Germanujo kaj Aŭstrio-Hungarujo 4 M. (2 Sm.), por ĉiuj aliaj landoj 2.250 Sm. La abonoj komenciĝas nur en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro. Laŭdcizire oni povas aparte aboni ĉiun el ambaŭ tute sendependaj eldonoj por la duono de la supre montritaj prezoj.

Esperanto Verlag Møller & Borel

BERLIN SW. 68, Lindenstr. 18/19.

DANUBO

MONATA ORGANO DE LA RUMANAJ KAJ BULGARAJ ESPERANTISTOJ

Internacia gazeto (32 p., 16x24) nur en Esperanto

Redaktata de speciala komitato

kun la kunlaborado de eminentaj diverslandaj Esperantistoj
Fundamenta, korekta stilo! Plej enhavriĉa! Plej malkara!

REDAKCIO-KAJ ADMINISTRACIO:

5, Str. I. C. Bratianu, BUCURESTI (Rumanujo)
Jara abono: 1.40 \$ (Fr. 3.50)

Persono, kiu abonigas 5 novajn personojn por jaro, rajtas ricevi senpage *Danubon* dum unu jaro. Specimena N-o nur kontraŭ respondkupono.

ESTAS MALFERMITA POR LA JARO 1912
ABONO AL LA GAZETO

“ LA ONDO DE ESPERANTO ”

Dum la IV-a jaro de sia regula funkciado « La Ondo » senpage donos al siaj abonantoj la tradukitan de S-ro M. Ŝidlovskaja

“ Princo Serebrjanij ” de TOLSTOJ

(352-paĝa, grandformata librejo, kies prezo por la neabonantoj estos Sm. 1.60 afrankite)

La abonpagon 2,120 Sm.) oni sendu al « Librejo Esperanto » (26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo) aŭ al aliaj Esper. librejoj, poŝtmandate, respondkupone, papermone aŭ per bankĉekoj. La Moskva librejo « Esperanto » akceptas la pagon ankaŭ per rusaj poŝtmarkoj. Oni povas aboni ankaŭ ĉe: ESPERANTIO, 10, Rue de la Bourse, Genève.

La Administranto (Gérant): MICHAUD

Laborista Kooperativa Presejo, 15, rue Amiral-Roussin. Dijon (Francujo).



SAMIDEANOJ, ATENTU!



Novajn insignojn
fabrikas la firmo

H.-E.-D. AUDOIN

81, Rue de Beaubourg, PARIZO

Pingloj, Broĉoj, Ĉependadoj, Ĉapelpingloj por sinjorinoj, Butonoj por manumoj kaj butontruoj; emajlitaj flagetoj por ĉapoj.

Flagoj, Flagetoj, Signaloj, Gvidiloj, Standardoj Medaloj, Metalmarkoj, Diplomoj, Brodaĵoj, Mortotukoj.

Specialaj modeloj registritaj. Grava rabato al vendistoj kaj esperantistaj grupoj 15 0/0

La firmo povas fabrikii ĉiujn specialajn signojn aŭ Standardojn kun surskribo laŭvole por Grupoj, societoj, k. t. p.

Riĉaj insignoj el arĝento kaj el oro

Petu la senpagan, ilustritan kaj kolorigitan katalogon kaj adresu ĉiujn leterojn al

S-ro Albert DUPUIS

Ĝenerala Agento

2, rue de l'Arc-de-Triomphe, PARIS (XVII^a)
kiu tuj respondos

SILKAJ ESPERANTAJ PROPAGANDILOJ

El belaj verdstelumitaj ŝtofoj. Universala uzado.

Flageto,	0.120 Sm.	Ĉapelpinglo,	0.560 Sm.
Brakbando,	0.400 Sm.	Vualskarpo,	1.320 Sm.
Kravatoj,	0.500 Sm.	Rubando, metro,	0.800 Sm.

Silka portreto de D-ro Zamenhof sur poŝtkarto, 0.300 Sm.

Kontraŭ respondkupono oni ricevas flageton kaj ilustritan prezaron. — Rabato pogrande. **B. PEYRAUD**, V.-Del. U. E. A., 54, rue Préfecture, **Saint-Etienne (Franc.)**.

"Selikan"

Tra la tuta mondo la nomo estas konata. Ĉu ĝi ne ankoraŭ troviĝas sur via inkboteleto? Se ne, tuj provu inkon "Selikan"! Ĝi estas fabrikado de perfekta kvalito, same kiel ŝribrubandoj kaj karbopaperoj de la marko "Selikan". Via paperisto ilin liveras al vi, sed postulu la markon "Selikan"! Pro spektu esperanta N^o 215 senpage sendata de la fabrikario

Güntzer Wagner, Hannover (Germanujo) kaj Vieno

HOTELO

LOUIS-LE-GRAND

2, rue Louis-le-Grand, PARIS

En belega loko, inter la rue de la Paix kaj Avenue de l'Opéra. Moderaj prezoj. Oni parolas en Esperanto, English Spoken. Man spricht Deutsch. Se habla Español.

Kvaroncentjara SPERTO pri Publikgarto



ILUSTRIGU

VIAJN

ENPRESAĴOJN

KAJ

ĈIUJN VIAJN

PRESAĴOJN

PER

LA

PUBLICITE

Esperanto

HERLEMONT

25, rue Saint-Vincent-de-Paul, PARIS (X^e)

Grafikaj Artoj de Publicite "ESPERANTO", Herlemont

ESPERANTISTA
POŝKALENDARO

por la jaro 1912

Redaktoro :

D-ro A. Schramm, reĝa asesoro,
Dresden.

La nova eldono enhavas, krom la ambaŭstila dataro kaj diversaj tabeloj, tre riĉan kaj valoran materialon, multe pli ampleksan ol en la antaŭaj jaroj. Multaj artikoloj informos la aĉetantojn de la libro pri ĉio, kio estas sciinda en Esperantujo, kaj pro tio la nova Poŝkalendaro estas bezonata libro por ĉiu esperantisto.

Pro la abundeco de la materialo la kompleta listo de la esperantistaj grupoj, kiu ĝis nun troviĝis en la Poŝkalendaro, aperos kiel aparta libro en Aprilo 1912

Prezo de la Poŝkalendaro (unua parto 0,80 M (0,400 Sm.) neafrankite,

Sendkostoj por Germanujo 0,10 M., por ĉiuj aliaj landoj 0,15 M. (0,075 Sm.).

Oni postulu specialan prospekton de **Esperanto Verlag Møller et Borel**

Berlin SW. 68, Lindenstr. 18-19

o o o o kaj korespondantoj o o o o

MIRALETTE (Leterpapero) necesega por ĉiu

Specimeoj (verde presitaj steloj por Poŝtkupono.

ESPERANTO, 25, rue Saint-Vincent-de-Paul, PARIS (X^e)